



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Novembro 2020 n-ro: 59



*Saluton,*

Jam alvenis aŭtuno en la norda hemisfero. Ekstere la temperaturo ankoraŭ estas bona sed iom post iom ĝi malaltiĝos. Kuracistoj instigas nin porti maskon dum ni troviĝas ekstere kaj ni estu en kontakto kun malpli da homoj, kiom ajn ĝi eblas. Ili ankaŭ proponas, ke ni vakciniĝu kontraŭ la kutima gripo viruso, por ke ni evitu la konfuziĝon de la diversaj kronvirusoj, kiom ajn ĝi eblas. En la suda hemisfero, kie nun venas printempo oni diras, ke la gripo ĉivintre estis en tre malalta nivelo, kaj tion ni ŝuldas al la uzado de maskoj. Tio ankaŭ signifas, ke maskoj protektos nin kontraŭ la Kovim-19 viruso.

Jam mortis 1.2 milionoj da homoj, kaj malsaniĝis preskaŭ 50 milionoj da homoj pro la nova ka danĝera viruso. Sed sciencistoj diras, ke tiu estas tre malalta takso pro la nesufiĉa nombro da testoj.


Junaj homoj kontraŭstaras la mezurojn oni metas kontraŭ la pandemio ĉar ili scias, ke la viruso ne

mortigos ilin. Sed ĉu ili povas esti certaj pri tio? Ĉu ili certas, ke ili ne kontibuos al la malsaniĝo de iliaj gepatroj? Ĉu ili certas, ke neniu serioza malsano trafos ilin dum la venontaj jaroj? Ĉu Kovim-19 viruso ne lasis spurojn kaj nevideblan detruadon en ilia korpo?

En ĉi ti numero kiel kutime estas sufiĉe granda kvanto de artikoloj, por ke vi legu dum vi restas hejme. Jen kelkaj el ili: La rakonto de japana hundo, Haĉiko; rakonto de Hipsipila el la greka mitologio; La popece publikigata romano, La Kimero; Rakontoj kaj artikoloj el Uzbekio, Japanio, Francio, Vjetnamio, Bulgario, Serbio, Albanio kaj multaj aliaj landoj; Legu la interesan rakonton pri la cifero naŭ; Legu kelkajn konkursaĵojn de la EKRA 2020 literatura konkurso; ktp. ktp.

*Bonan legadon al ĉiuj !*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Granda Sukceso!	4
Tempo Sigelita	5
HIPSIPILA (ΥΨΙΠΥΛΗ)	6
El la libro de "Dao de Jing"	9
Helga Ploetner – Esperantistino el Germanio	9
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	10
Nokta Ĉielo	11
Elefanto kaj Mopso	11
La Kimero - Rakonto el la estonteco (6)	12
Ŝercoj tradukitaj de Antanas Vaitkevičius	13
El la literaturaj paĝoj de MAS	14
Astrologio - Novembro/Skorpioj	16
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	17
La mallibera cikonio	17
La itala pejzaĝo (1961)	18
Amuza Matematiko	19
Dek konsiloj por sukcesi kaj atingi viajn celojn en la vivo	19
Pri la cifero naŭ	20
Poemetoj	21
La hundo de l'mondofinaĵ	21
La rakonto de veterano	22
Esperanto – Internacia lingvo	23
Kurcvortenigmo	23
HO, HOMARO! (aŭ invito al medito)	24
75-jariĝo de la fino de la Okinava Batalo (3)	25
Mi kaj marto (EKRA2020)	27
Muzo de Esperanta poezio (EKRA2020)	27
Ŝercoj	27
La aventuroj de Jombor kaj Miki	28
Esperanto por mi	29
Mirinda renkonto (1/10)	30
Solvo de la krucvortenigmo	30
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

## Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

Junula sopir' –  
printempa koncerto per  
du muzikiloj.  
Ĉu belarta konkurso?  
lama bonhumoro ...



Eldoni libron  
dum la virusa tempo  
meritas laŭdon.  
Labori por sumoo  
estas necesa por  
ni...



Je la marbordo –  
iu ŝipo foriras.  
Birdoj ĝin sekvas ...  
Vizitantoj rigardas  
la belan panoramon.



Flugas la semoj  
de la leontodo... Kaj  
la homaj revoj.



verkis kaj sendis **Elena Popova** el  
Bulgario  
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



### Rezulto de la 65-a Sumoo

En tiu ĉi Sumoo partoprenis 336 homoj el

34 landoj. Ni legis ĉirkaŭ 20.000 paĝojn. Ekde la unua Sumoo en septembro 2009 entute 12.908 homoj partoprenis.

### Laŭlandaj partoprenantoj:

1. Japanio: 68
  2. Ĉinio: 45
  3. Brazilo: 40
  4. Francio: 32
  5. Pollando: 20 / Germanio: 20
  7. Rusio: 15
  8. Italio: 12
  9. Britujo: 11
  10. Hispanio: 9
- sekvas Nepalo (8), Vjetnamio (8), Usono (5), Ĉeĥio (5) ... Turkio (2) ...

### Perfektaj venkintoj (15 venkoj):

310 el 336 (92,53%)

**Kvanto de legitaj paĝoj:** pli ol 20.000 paĝoj (60 paĝoj por unu homo)

**La novembra Sumoo komenciĝos la 8-an de novembro dum 15 tagoj**



## UEA



N-ro 913 (2020-10-23)  
**Mesaĝo de UEA okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, 24 oktobro 2020**

La 24-a de oktobro, la Tago de Unuiĝintaj Nacioj, markas la daton en 1945 kiam la Ĉarto de UN ekvalidis kaj UN formale ekestis. Sepdek kvin jarojn poste, ni retrorigardas al tiu tago kiel al unu el la plej grandaj atingoj de la homaro. [...]

N-ro 912 (2020-10-20)

### UEA invitas prelegi en la 74-a IKU-sesio en Belfasto

Kadre de la 106-a UK en Belfasto okazos la 74-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. La rektoro estos prof. Michele Gazzola kaj helpos al li prof. Reinhold Medina. [...]

N-ro 911 (2020-10-02)

### Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto, 2 oktobro 2020

Ĉiujare, Unuiĝintaj Nacioj festas la 2-an de oktobro kiel Internacian Tagon de Ne-perforto – tagon kiam ni laŭdas la potencon de pacaj ideoj por movi la homaron al la bono. En tiu tago en 1869 (antaŭ ĝuste 150 jaroj), naskiĝis la granda pioniro de la filozofio [...]

N-ro 910 (2020-10-01)

### Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de Pli Aĝaj Personoj

Ĉiujare, la 1-an de oktobro, tra la pasintaj tridek jaroj, Unuiĝintaj Nacioj festas la Internacian Tagon de Pli Aĝaj Personoj – tagon por memorigi pri iliaj atingoj kaj atentigi pri ilia graveco en socio, sed ankaŭ por altiri atenton al la problemoj kiujn tiom da pli aĝaj personoj frontas. [...]

## TEJO



### Partoprenu en video por esploristoj pri Esperanto

Ĉu vi esploris aŭ esploras pri Esperanto? Ĉu vi volas kundividi viajn malkovrojn kaj kontakti kun aliaj esploristoj? Sendu videon kaj rakontu pri via sperto! Menciuj tion, kion vi trovas esplorinda pri Esperanto aŭ Esperantujo. Vi povas respondi al jenaj demandoj: [...]

### La legorondo de TEJO

Ĉu vi ŝatas legi librojn en Esperanto?

La legorondo de TEJO estas neformala, senpaga grupo sub la interesgrupo pri Kulturo, kiu kunvenas ĉiun monaton por preparoli literaturon verkitan en la internacia lingvo. [...]

### Iĝu TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo (2020-2021)

Kadre de la Eŭropaj Solidaraj Korpusoj, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. [...]

### Quentin, la nova TEJO-volontulo

Ni ĝojas prezenti al vi la novan TEJO-volontulon Quentin Auduc! El kiu lando vi estas? Mi venas el Francio. Pli precize, mi venas el Bourgogne, oriente en Francio. [...]






## Leteroj de niaj legantoj



Dankon!  
Bonfarton kaj pliajn sukcesojn al vi karaj!  
Amike kaj altestime  
**Gafur Mirbazaev** el Uzbekio



Karaj,  
Mi ricevis la nonanv "Turkan Stelon"  
Dankon kaj multajn salutojn de  
**Margarete Bastian** el Germanio



Karaj amikoj!  
Mi kore dankas pro la 058-n n-rn de "Turka Stelo". Denove mi povis legi en ĝi interesajn verkojn. Gratulon al vi pro via senlaca laboro! Estas grava via laboro por Esperanto kaj pere de ĝi por ni, kiuj legas vian revuon.  
Amike salutante,  
**Szabadi Tibor J.** el Hungario

## Granda Sukceso!

### GRANDA SUKCESO DE LA INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO "HRISTO GOROV"

En 2020 Bulgara Esperanto-Asocio sepan fojon organizis la Internacian Esperantan Literaturan Konkurson "Hristo Gorov". La konkurso estas tradicia kaj en ĝi partoprenas Esperantaj aŭtoroj el diversaj landoj. La nomo de la konkurso estas "Hristo Gorov" - unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj.

Hristo Gorov naskiĝis la 18-an de julio 1908 en vilaĝo Brodi, en norda Makedonio, nun en Greklando. Dum la milito inter la balkanaj landoj en 1913 vilaĝo Brodi estis bruligita kaj la familio de Hristo Gorov fuĝis al Bulgario.

Jam kiel junulo Hristo Gorov ellernis Esperanton. Dum 1929 li komencis aperigi siajn verkojn en Esperanto, en Esperanto-Praktiko kaj en aliaj Esperantaj revuoj kaj ĵurnaloj. Gorov estis unu el la aktivaj kunlaborantoj de Bulgara Esperantisto. En 1931 li estis invitita partopreni en la fonda de la Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantistaj Verkistoj (IAREV), kies prezidanto estis la fama germana verkisto Ludvik Renn.

En 1932 Hristo Gorov aliĝis al Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE) kaj kunlaboris al

Internaciisto kaj Sur Posteno. En Nova Epoko aperis liaj poemoj Post la fronto kaj Fabelo pri rivero. Eldonejo EKRELO eldonis lian novelaron Ĉe abismo.

Post la Dua Mondmilito Hristo Gorov daŭrigis sian Esperantan verkistan agadon. Liaj artikoloj, poemoj, noveloj kaj tradukoj aperis en Bulgara Esperantisto, Paco kaj en multaj aliaj Esperantaj revuoj kaj ĵurnaloj. Li verkis ne nur en Esperanto, sed en bulgara lingvo kaj li aperigis plurajn bulgarlingvaj librojn: romanojn kaj novelarojn. Dum multaj jaroj Hristo Gorov esti prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio.

Ĉijare en la literatura konkurso partoprenis Esperantaj verkistoj el **Brazilo, Francio, Irano, Kongo, Rusio, Litovio, Ĉeĥio, Turkio, Germanio, Rumanio, Italio, Britio, Tanzanio, Armenio, Pollando, Slovakio, Ukrainio, Nov Zelando, Bulgario**. Ili sendis 16 rakontojn kaj 8 eseojn.

La Internacia Esperanta Literatura Konkurso "Hristo Gorov" elokvente montras, ke la originala Esperanto-literaturo estas tre grava por la Internacia Lingvo. La geesperantistoj el la tuta mondo ne nur ŝatas la literaturon, sed multaj el ili kreas valorajn Esperantajn verkojn.

**Georgi Mihalkov** – prezidanto de la ĵurio

**HACHI-KO, La sembola hundo**

La rakonto de profesoro Ueno kaj lia fidela hundo Hachi-ko (esperante Haĉiko), kies statuon oni starigis en Tokio, iras al antaŭ cent jaroj. Profesoro Ueno adoptis Haĉikon, kiu estis granda blanka virhundo el pura Akita raso, kiam ĝi ankoraŭ estis eta, beba hundo. La eksterordinaraj trajtoj de Haĉiko estas aparte evidentaj en la lojaleco pri ĝia posedanto.



Ĉi tiu bonkondata granda blanka hundo devigis sin eskorti sian posedanton ĝis la fervoja stacidomo ĉiumatene. Ĉiu vespere en la sama horo, ĝi iris al la antaŭo de la stacidomo kaj atendis la eliron de sia posedanto, kaj poste li revenis hejmen kun li.

Haĉiko fariĝis hundo konata de ĉiuj en tiu kvartalo.

Sed iam okazis neatendita situacio. Kiel kutime, Haĉiko iris al la stacidomo por renkonti sian posedanton kaj atendis. Sed profesoro Ueno ne aperis ĉe la pordo kaj Haĉiko atendis ĝis matene sen palpebrumi. Ekde tiam la fidela hundo Haĉiko daŭre atendis sian posedanton sen forlasi la ejon kaj ĉi tiu legenda atendado daŭris dum ekzakte 9 jaroj. Dum 3200 tutaj tagoj, Haĉiko ne forlasis la fronton de la stacidomo eĉ por unu momento.

La laboristoj de la stacidomo rigardadis mire la hundon. Ĉar ĝi ne sciis, kio estas morto, ĝi ne komprenis, ke ĝia posedanto mortis; ĉar ĝi ne sciis, kio estas tempo, ĝi ne dubis pri la reveno de sia posedanto dum 9 jaroj. Ĝi obstine atendadis la momenton, kiam lia amata posedanto ekaperos ĉe la pordo de la stacidomo kiel kutime. Ĉi tiu grandioza amrakonto kaj malofta lojaleco emociigis la personaron de la stacidomo kaj la butikistojn de la ĉirkaŭaĵo. Ili komencis nutri Haĉikon; kaj kiam necese provis protekti ĝin de malvarmo. La reputacio de Haĉiko baldaŭ disvastiĝis en la kvartalo, poste en la urbo, kaj pli poste en la tuta lando.

La malĝoja atendado de ĉi tiu amikema granda blanka hundo finiĝas pere de ĝia morto ĉe la pordo de la Fervoja Stacidomo Shibuya, sekve de la maljuneco

kaj laceco pro ĝia atendado por sia amata posedanto. Sed la legendo pri Haĉiko ĝuste tiam komenciĝis.

La hundostatuo, kiun hodiaŭ Tokiaj vizitantoj renkontas ĉe la pordo de la stacidomo de Shibuya, estas tiu de Haĉiko. Kiel simbolo de lojaleco kaj homa-besta rilato, japanoj tuj post la morto de Haĉiko starigis ĝian statuon tie, kie ĝi atendis sian posedanton dum 9 tutaj jaroj.

Kiam la statuo estis detruita dum la Dua Mondmilito, japanoj starigis novan en 1948. Hodiaŭ ĉi tiu pordo de stacidomo Shibuya estas konata kiel la elirejo Haĉiko kaj estas unu el la plej gravaj renkontiĝejoj en Tokio. "



La fidela estaĵo Haĉiko, kies vivo estis resumita supren, estis la temo de du apartaj filmoj. La japana versio "Hachikō Monogatari" (1987) de Seijirō Kōyama kaj la Usona versio "Hachi: A Dog's Tale" (2009) de Lasse Hallström.

"Hachi", en la japana signifas ok kaj "Ko" historie estis titolo donita al feŭdaj sinjoroj, sed la vorto pli poste akiris malsamajn signifojn. En ĉi tiu okazaĵo ni povas diri, ke ĝi aldonas la signifon pri "respekto kaj amo". Sed en aliaj fontoj, estas skribite, ke ĝi aldonas la signifon de "fidela".

Unue mi devas konfesi, ke mi spektis la unuan version (t.e. la japana) de ĉi tiu vera vivrakonto kun larmoj. Poste mi spektis la version de Lasse Hallström, kies ĉefrolulo estis Richard Gere, sed mi ne estis tiom impresita. Eble iu, kiu unue spektos la usonan emociiĝos pli ol mi. La direktoro de Hachikō Monogatari, Seijirō Kōyama, kaj la aktoroj estas japanoj. Tiurilate ni povas diri, ke ili pli sukcesis reflekti kaj sentigi ĉi tiun rakonton el siaj lando. La alia filmo, en kiu Richard Gere sukcese ĉefrolis, estas iomete la modifiita versio de ĉi tiu rakonto.

En la unua filmo, krom la profesoro, kiu posedas Haĉikon; lia filino, lia edzino, lia bofilo kaj iuj aliaj karakteroj estis priskribitaj kiel nesentemaj homoj kontraŭ Haĉiko. Sed laŭ la fontoj, preskaŭ ĉiuj amis

**E**stas sciate, ke en nia vivo ne estas regulo, laŭ kiu la bona homo estas rekompencata per destino favora. Ofte, homoj vere bonaj, bonkoraj kaj bonfaremaj havas sorton malbonan, vivon malfacilan, kelk-foje malfeliĉan. Tio ĉiam kaŭzis kaj ĝis nun kaŭzas silentajn aŭ laŭtajn plendojn de la homoj kontraŭ la dioj. Ŝajnas tamen, ke, komprenata de la homoj natura ekvilibro pri tiaj misteraj aferoj, ne estas! Mi akceptas tion, tamen mi faras la prologon, ĉar tiu ĉi rakontado koncernas tian personon, la bonkoran mitan reĝinon Hipsipilan.



En la Egea Maro (Αιγαίον Πέλαγος), inter la multaj grekaj insuloj kaj insuletoj, estas Lemnoso (Λήμνος), unu ankoraŭ pitoreska, belega gemo de la mirinda helena lando.

Tiu insulo estis kaj ĉiam estas senmezure alloga, eble ĉar ĝi estis benita de du grandaj dioj! Lemnoso estis la amata loko de la bona, kripla dio, Hefesto (Ἥφαιστος), la nekomperebla artisto-teknikisto, kiu sur la insulo estis instalinta sian ĉefan laborejon. La dua granda dio, kiu aparte ŝatis la insulon, estis Dionizo (Διώνυσος), la dio de la fekundado, de la ĝoja vivo, de la distro kaj precipe de la vin-trinkado. Dionizo amis tiom multe Lemnoson, ke li donacis al ĝi ne nur la vinon, sed apartan specon de vere deca al dioj trinkaĵo, moskatelon, dolĉan vinon, kiu, ekde la tre fora antikveco kaj ĝis nun, estas produktata nur tie.

Reĝo de Lemnoso estis unu el la kvar filoj de Dionizo, nomata Toaso (Θάσας) kaj ties filino estis la bela, bonkora Hipsipila. La vivo sur la insulo, longe pasis serene, pace, kaj agrable, sed ŝajnas ke granda danĝero minacis tiun feliĉon, kaj tiu danĝero havis la nomon Afrodita (Αφροδίτη). Jes, la diino de la amo kaj belo ne simpatiis Lemnoson kaj speciale la Lemnosaninojn. Kiel sciate, Afrodita estis, almenaŭ formale, edzino de Hefesto. Tamen, la homoj ĉiam paroladis pri la senĉesa adultado de la amorema diino kaj ŝajnas, ke, precipe la virinoj de Lemnoso, eble pro sia aparta amo al sia patrono, al la daŭre kokrita Hefesto, ne multe amis la diinon. Ili tre ofte, senrespekte klaĉadis pri la afero kaj, fine, tio iĝis ilia

kutimo. Ili komencis neglekti siajn religiajn devojn al la granda diino, kies la sanktejoj restis malplenaj. Tio, kompreneble, kaŭzis la koleron kaj pli poste la indignon de la fiera diino, kiu malbenis ĉiujn virinojn de Lemnoso, puninte ilin terure. La virinoj komencis eligi el sia tuta korpo abomenan, tre malbonan odoron, ian fetoron, putrodoron, ian nepriskribeban, kompreneble netolereblan, fiodoron. Ĉiuj virinoj vane klopodadis sin liberigi de la terura malsano; la senĉesa banado, la uzado de abundaj parfumoj, de diversaj aromaĵoj, bonodoraĵoj, ne helpis. La malbona odoro restis kaj estis tiel forta, ke neniu homo povis eĉ stari apud ili. La viroj ne plu povis proksimiĝi al siaj edzinoj, kaj amatinoj, ili ne povis resti kaj vivi sub la sama tegmento kun ili, kaj, kompreneble, ili ne plu povis seks-kuniĝi kun ili. Ekzakte tion celis la puno de Afrodita, kiu agis ĉiam en la kadro de sia propra respondeco kaj taskoj. La virinoj komprenis la kialon de la granda malfeliĉo, ili komencis plenumi pie, eĉ bigote, siajn religiajn devojn al Afrodita, per sinsekvaj publikaj preĝoj, ceremonioj, sanktoferoj, klopodadis kvietigi la koleron de la diino, sed tute vane, la situacio ne ŝanĝiĝis.

La tempo pasis kaj la viroj, kiuj kompreneble havas bezonojn kiuj ne povas longe atendi, sin turnis al la najbaraj insuloj kaj al la ne malproksima Trakujo (Θράκη). En la komenco ili vizitadis tiujn lokojn, en kiuj ili trovis belajn, freŝajn kaj bonodorajn virinojn, kaj iom pli poste ili komencis venigi ilin en Lemnoso. Kompreneble, tio vekis al la lokaj virinoj tre malbonajn sentojn, ĵaluzon, koleron, indignon, malamon; kaj kiam la fremdulinoj plimultiĝis, kiam komencis la naskiĝo de la unuaj idoj, la malestimaj kaj humiligitaj virinoj decidis reagi rigore. Ili kolektiĝis sekrete kaj unuvoĉe decidis, subite, sturme, ekatakis, en antaŭdifinita nokta momento, kaj murdi ĉiujn plen-kreskajn virojn de la lando.

Mi diris "unuvoĉe", tamen tio estas ne tute ĝusta, ĉar estis nur unu virino, la reĝidino Hipsipila, kiu kontraŭstaris, kiu per sia tuta forto, klopodis konvinki la virinojn ne fari la teruran krimon. Ŝi faris ĉion kion ŝi povis por ŝanĝi la fatalan decidon, sed ŝia voĉo estis unu kontraŭ ĉiuj aliaj. Do, la konspira plano estis sukcese plenumita, kaj en nur unu nokto, ĉiuj viroj kaj ĉiuj fremdaj virinoj estis mortigitaj! Sur la tuta insulo restis nur virinoj!

Ankoraŭfoje mi ne diras la tutan veron, ĉar estis mortigitaj ne ĉiuj viroj; estis unu, nur unu, kiu estis savita. Tiu viro estis Toaso, la reĝo de la insulo, la







patro de Hipsipila. Jes, Hipsipila perfidis siajn koleginojn, ŝi lasis ilin mortigi siajn edzojn kaj parencojn, tamen ŝi ne povis fari tion al sia amata propra patro. Ŝi sekrete helpis lin eskapi per boato aŭ per io alia, al la insulo Ĥio (Χίος), kie reĝo estis lia frato Ojnopiono (Οινώπιων).

Multajn jarojn pli poste, la homoj diradis, ke je la savo de Toaso Hipsipilan helpis Dionizo mem, kiu, kompreneble, ne deziris la morton de sia filo. Tamen, ni lasu tion, mi diru, ke Hipsipila iĝis reĝino de Lemnoso, kie, ekde tiam, regis matriarkeco, aŭ, pli ĝuste, virinokratio. La virinoj iĝis terkultivistoj, bredistoj, paŝtistoj, fiŝkaptistoj, ĉasistoj, teknikistoj, eĉ militistoj ili iĝis, nur pro tio, por malhelpi ĉiun ajn viron atingi la insulon.

Estis ankoraŭfoje pruvite, ke la virinoj povas fari ĉion kion la viroj faras, tamen, estis ankaŭ pruvite, ke, same kiel la viroj, ankaŭ la virinoj havas bezonojn, kiuj ne povas atendi! En tiu okazo estis ne nur la sopiro al la vira brakumo, sed ankaŭ la turmenta konscienc-riproĉado, kiun ĉiuj virinoj sentis pro sia terura krimo, pro la ekstermo de la tute senkulpaj viroj. Krome, Hefesto, la bonkora dio, kiu malĝojis pro la malfeliĉo falinta sur lian amatan insulon, petis de Afrodita ĉesigi la severan venĝon. La instruo estis prenita, la puno estis sufiĉa kaj, krome, nur sur la punita insulo regis situacio tute ne konvena al la taskoj kaj deziroj de la diino; Lemnoso estis la sola loko de la tuta helena lando sur kiu ne floris amo, amoro, seksumo!

Do, la malbona odoro iom-post-iome malaperis kaj kiam la insulon atingis la informo, ke grandega ŝipo kun multaj junaj viroj alproksimiĝas, la virinoj ne nur bonodoris, sed, trafite de Eroso (Έρως), estis plenplenaj je amorpasio. Tiu granda ŝipo estis la fama Argoo (Αργώ), la ŝipo per kiu la kvindek plej grandaj,

gloraj kaj famaj en la tuta mondo helenaj herooj, la alnomitaj Argonaŭtoj (Αργοναῦται), militiris al la fora Kolĉido (Κολχίς), por konkeri la Oran Ŝaf-felon (Χρυσόμαλλον Δέρας). La Lemnosaninoj, tiun fojon, ne nur ne provis malhelpi la elŝipiĝon, sed bonakceptis la brilajn fremdajn militistojn. Helpe de la loka mirinda dolĉa vino kaj la sagoj de Eroso, la Argonaŭtoj ĝuis mirandan gastadon. Tiale ili restis longe en Lemnoso, tiom longe, ke preskaŭ ĉiuj junaj virinoj havis la eblon kuniĝi kun viroj vere unikaj!


La Argonaŭtoj foriris kaj post nelonge venis multaj naskiĝoj, poste komencis atingi tute libere la insulon multaj vizitantoj, gastoj, fianĉoj, novaj edzoj, la vivo revenis en la ordinaran fluon.

Ĉu, do, ĉio estis en ordo? Ne! Multaj virinoj suferis ankoraŭ pro la rimorso; nun, kiam la tuta aventuro estis finita, ili sopiris al la perditaj edzoj, fratoj, patroj, ili pentis pri sia nepardonebla peko. Oni diras, ke kelk-foje la kalmo estas pli danĝera ol la ŝtormo. Mi diras tion,, ĉar kiam fremduloj komencis libere atingi la insulon, kun ili venis ankaŭ kelkaj interesaj novaĵoj, inter kiuj estis ankaŭ tio, ke la malnova reĝo de Lemnoso, Toaso, vivas en Ĥio, en la palaco de sia frato. La etoso estis tiam tiom venenita, ke la informo estigis ĝeneralan eksplodon. Iĝis konate, ke la reĝino Hipsipila estis savinta sian patron, ke ŝi estis perfidinta la ceterajn virinojn, kiuj tute ne hezitis mortigi tre amatajn siajn personojn por sin komformigi al la komuna decido.

Hipsipila estis arestita kaj tre severe molestita. La preparado de ŝia ekzekuto estis komencita, tamen, la lastan momenton, voĉoj saĝaj de multaj virinoj, kiuj estis ĝuintaj la bonfaremon de la bonkora reĝino, superis la venĝemon.

Hipsipila ne estis ekzekutita, ŝi estis vendita, kiel sklavo, al sovaĝaj piratoj, kiuj, submetinte ŝin al sufer-plena navigado, finfine vendis ŝin al la reĝo de la malproksima Nemeo (Νεμέα), nomata Likurgo (Λικούργος). Tie, Hipsipila iĝis servistino kaj pli poste gubernistino de la gefiloj de la reĝo.

Venis periodo nova, kvazaŭ trankvila, tamen la sorto de la malfeliĉa Hipsipila kaŝis ankoraŭajn suferojn. Ŝi estis vartistino de la plej juna filo de Likurgo, Ofelto (Οφέλτης), kiu estis ankoraŭ bebo. Unu tagon, kiam ŝi estis kun la bebo en loko kampara, iom malproksime de la palaco, ŝi renkontis taĉmenton apartenantan al la granda armeo de la sep renomaj strategoj, kiuj estis pretaj ekiri kontraŭ Tebon (Θήβαι). La granda ekspedicio estis aprobita kaj subtenata de ĉiuj severenoj de la regiono, do, Hipsipila ne surpriziĝis kiam la estroj de tiu taĉmento demandis ŝin pri iu fonto kaj petis, ke ŝi montru al ili la direkton kiun ili devis sekvi por atingi ĝin. La ĉiam afabla Hipsipila



volonte sin oferis helpi la fremdulojn, do, ŝi lasis sur herbamaso la lulilon de la bebo kaj ŝi faris du aŭ tri paŝojn, por montri al la viroj la ĝustan padon. Estis ja nur tri paŝoj kaj nur kelkaj momentoj, tamen, en tiu fatala mallonga tempo, venena serpento, kaŝita en la herbejo, ekjetiĝis kaj mordis la bebon, kiun la kuracistoj ne povis savi, kiu post nelonge mortis!

Nepriskribebla nova malfeliĉo, nova fatalaĵo batis la povran Hipsipilan.

Estis granda funebro en la palaco kaj en la tuta lando kaj estis senlima la indigno de ĉiuj kontraŭ la neglektema servistino, kiu trompadis la reĝon kaj forlasis, tute ne zorgis pri la malfeliĉa bebo! La forte ŝokita reĝo ne longe pripensis la aferon por atingi sian juĝon. Estis ankoraŭfoje decido pri publika ekzekuto de la malbonsorta Hipsipila!

Ĉio estis preta, Hipsipila atendis, tiun fojon sen amaraj sentoj, la morton, kiam la esplora taĉmento de la gastanta en la urbo armeo revenis. La oficiroj, kiuj sin prezentis por esprimi kondolencon pro la granda perdo de la reĝo, hazarde informiĝis pri la kondamno de la senkora sklavino, kiu kulpis pri la morto de la infano. Tiam, la honestaj armeestroj, kiuj bone sciis la veron, rakontis al la reĝo kio ekzakte okazis kaj atestis pri la senkulpeco de la virino. La decido de la justa reĝo tuj ŝanĝiĝis, Hipsipila estis ankoraŭfoje savita, tamen, post la lasta sortobato, ŝi ne plu povis senti ĝojon, nun ŝi estis ankoraŭ pli malfeliĉa.

Mi diru ĉi tie, ke la du filoj de Hipsipila, Eŭneo (Εύνηος) kaj Nebrofono (Νεβροφών), kiuj estis infanoj kiam ilia patrino estis vendita al la piratoj, estis jam plen-kreskaj viroj, kiuj longe jam trairadis la tutan Helenlandon, serĉante pri sia perdita patrino. Tute hazarde la du junuloj kun sia sekvantaro atingis Nemeon, la tagon, en kiu estis organizita la granda funebra ceremonio kaj celebrado omaĝe al la perdita princo. Laŭ la loka kutimo, inter la diversaj aranĝoj de

la celebrado, estis ankaŭ atletaj konkursoj, nomataj "Surtombaj Ludoj" (Επιτάφιοι Αγώνες). La fremdaj, junaj nobeloj, invitite, volonte partoprenis la ludojn por respekte honori la funebrantan reĝan familion. Ĉar ili venkis en kelkaj ludoj, laŭ la kutimo, ili estis invititaj de la reĝo mem, kiu afable akceptis ilin. Amike interparolante, la du bravaj junaj viroj, demandite, rakontis al Likurgo ĉion pri sia insulo, pri sia vivo, pri la malfeliĉigaj okazintaĵoj, pri la malbona sorto kiu senindulge batis ilian patrujon, ili detale parolis pri sia perdita patrino kiun ili longe priserĉadis, kaj vorto post vorto estis elvolvita la tuta vero. Likurgo ion suspektis, ion komprenis, li ordonis ke oni venigu la fremdan servistinon, kiu ĉiam parolis pri sia belega, sed malfeliĉa patrujo, kaj tiam ĉio malkovriĝis, neatendita, ekstrema feliĉo kaj ĝojo finfine kronis la mult-suferan virinon!

La sklavino estis elliberigita kaj pompe kondukita de siaj filoj al Lemnos, kie ŝi estis kun honoroj akceptita de la tuta popolo!

Reĝo de la insulo iĝis la pli aĝa filo de Hipsipila, Eŭneo kaj ekde tiam sur la insulo regis prospero kaj feliĉo. La virinoj, posteulinoj de tiuj severe punitaj blasfemulinoj, ne nur akurate oferadis siajn servojn kaj ritojn al Afrodita, sed, eble helpe de la ebriiga loka muskatvino, tre ofte ili pruvadis praktike sian sindediĉon kaj obeemon al la instruoj kaj stimuloj de la diino. Tiele, ankaŭ la viroj estis feliĉaj, ĉio fluis glate, ĉio estis en ordo!

Hipsipila ne tute mortis, ŝi restas sur la ĉielo, de kie ŝi memorigas al ni sian tristan historion. Mi diras tion, ĉar la homoj honoris ŝin, doninte ŝian nomon al asteroido (587 Hypsipyle). La samo okazis ankaŭ pri ŝia filo Eŭneo, kiu porĉiame estos la asteroido "7152 Euneus".

El tre antikvaj fontoj estis elĉerpita la informo, ke la granda antikv-helena tragediverkisto Eŭripido (Ευριπίδης) estis verkinta tre belan tragedion kun la titolo "Hipsipila", tamen tiu verko ne estis trovita, estis savita nur unu papiruso, do, teksto de nur malmultaj paĝoj. Domaĝe!

## GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

(elekto, aranĝo de la bildoj, de Kostas Kiriakos)

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio



**DUA PARTO - LA VIVO**

75



**La popolo malsatas,  
ĉar la superuloj voras tro da impostoj;  
tial ĝi malsatas.  
La popolo regeblas malfacile tial,  
ĉar la superuloj tro multe agas;  
tial ĝi regeblas malfacile.  
La popolo akceptas la morton tro facilanime.  
ĉar la superuloj tro abunde serĉas la vivplenecon,  
tial la popolo akceptas la morton tro facilanime.  
Sed tiu, kiu ne tro agas por la vivo,  
estas pli bone ol tiu, al kiu la vivo estas tro kara.**

**Rimarkoj de Anniespera:**

Vilhelmo:

„Sed tiu, kiu ne tro agas por la vivo,  
estas pli bone ol tiu, al kiu la vivo estas tro kara.“  
Pri tiuj ĉi frazoj en Ĉinio la ĝenerala opinio estas tia, kia  
tradukis ĝin Wang Chongfang:  
„Estas pli saĝaj ol tiuj, kiuj tro ŝatas sian vivon.“

**Rimarkoj de Cezar**

Tiu ĉapitro esprimas malnovan tutmondan plendon, kiu tute  
validas ĝis nun. La regantoj tro pensas pri si mem, kaj malpli  
pri la bonfarto de „sia“ popolo. Ekzemple la rusa prezidanto,  
al kiu la olimpika ideo valoras la gigantan sumon de 50  
miliardoj da eŭroj. Mi povas imagi, ke multaj rusoj pensas  
alie pri tio, ke ili volus uzi la monon por pli gravaj aferoj.

**(daŭrigota)**

**Helga Ploetner – Esperantistino el Germanio**

**sendis Elena Popova el Bulgario**

**H**elga Ploetner, mia amikino el Germanio,  
naskiĝis dum la Dua mondmilito kaj ekde sia  
infaneco ŝi konas la malriĉecon, sed kaj la  
bonecon de la homoj.

Ŝi rakontas, ke ŝi komencis pentri ekde kiam ŝi  
esti 3-jara. Inter 1974 kaj 1978 ŝi studis en Speciala  
Distrikta Kulturakademio en Halle/ Saale. Inter 1988-  
1989 ŝi studis en Akademio de Halle en Drezdeno pri  
pentroarto kaj grafiko. Ŝi instruis kiel docento al  
gelernantoj kaj studentoj. Kaj ĝis nun, malgraŭ la  
malsanoj, ŝi daŭras pentri homojn, animalojn, la  
naturon. Bona kaj forta estas la spirito de mia amikino!

Ŝia patro ludis mandolinon en urba orkestro kaj  
ŝi ankaŭ ludis.

Ŝia patrino jam rakontis al ŝi pri la Internacia

Lingvo Esperanto kaj en 1980 ŝi  
eklernis la lingvon. Jam dum 40 jaroj ŝi  
laboras por la esperanta ideo pri paco  
kaj amikeco inter la homoj.

Helga faris ekspoziciojn en  
Germanio, Bulgario, Pollando ktp.

En 2020 aperis la libro ESPERANTO POR MI en  
eldonejo Horizonto, Japanio, kun ŝiaj desegnaĵoj de  
16 geesperantistoj portretoj el diversaj landoj. Nun ŝi  
pentras la portretojn de la sekvonta libro. Tiel ŝi, kune  
kun la eldonisto Hori Jasuo, donacas ĝojon al multe  
da homoj.

Al mi plaĉas ŝiaj bildoj kaj portretoj kaj mi verkis  
laŭ ili hajkojn kaj tankaĵojn. Mi faris Amikan poŝton. Jen  
kelke da ili:



**Maro ondiĝas  
sub la bunta ĉielo.  
Baldaŭ sunbrilos.  
La mar' kiu atendas?  
Ĉu amantaj okuloj?**



**La patro ludis  
mandolinon . Kaj Helga.  
Muzikaj horoj...  
Belega memoro kun  
la talenta famili'.**



**Propra portreto –  
esper' en la okuloj  
por sukcesa voj'.  
Emocia animo  
kaj forta spirito. Ja.**



Eŭgeno Miĥalski  
libera torento katenita

**K**omparu la sekvantajn versojn

*Ĉu ekzistas eĉ "mi mem"?*  
*Eble "mi" estas nur fantazio?*


kun la jenaj:

*Mia brusto potenca*  
*similas al ŝtal'.*  
*timas, alvokas*  
*al fajra batal'.*

Kion ni pensu pri poeto, kiu donas tiom diferencajn bildojn pri si mem? Ĉi tiuj versoj, prenitaj el du apartaj poemoj, estas verkitaj de la sama poeto, la ruso Eŭgeno Miĥalski, kaj en la sama periodo, probable en la sama jaro, 1919. Ili prezentas du aspektojn de la poeto, du malsamajn membildojn. Kio kaŭzas tiun drastan diferencon? Ni rigardu unue la malmulton, kion oni scias pri la vivhistorio de Miĥalski.

Eŭgeno Miĥalski naskiĝis en 1897. Profesie li estis instruisto kaj bibliotekisto. Li lernis Esperanton kiel junulo kaj baldaŭ aktivis kiel movadano kaj poeto. En 1917 li fondis literaturan revuon, Libera Torento, en la urbo Saratov, kie aperis liaj unuaj poemoj. Miĥalski fariĝis aktiva apoganto de la sovetia reĝimo kaj same partoprenis la internacian laboristan movadon kiel kunlaboranto de laboristaj gazetoj. Pro senfunda akuzo pri partopreno en kontraŭsovetia trockiista organizaĵo li estis arestita la 16-an de marto 1937. Laŭ tribunala decido de la 14-an de oktobro 1937 li estis verdiktita al mortpafo. La verdikto estis plenumita la 15-an de oktobro 1937 en Kievo. Laŭ decido de Milita kolegio de la Supera Juĝistaro de USSR de la 8-a majo 1958 Miĥalski estis rehonorigita postmorte.

La versoj cititaj komence estas prenitaj el la du ĉefaj poemlibroj de Miĥalski: la unuaj el Prologo (1929), la duaj el Fajro kuracas (1932). La unuaj estas la finaj linioj de iom longa poemo, titolita Ajno; la duaj el poemo nomita Forĝisto. Laŭ indikoj post la poemoj ili estis verkitaj en Saratov en la sama jaro, 1919. Malgraŭ tiu samtempeco tiuj poemoj, kaj ja la du poemlibroj mem, draste malsimilas je temoj kaj vidpunktoj. Personaj deziroj, pasioj, amo estas la ĉeftemoj de Prologo en ligo kun sentoj de malespero, kiam la poeto dubas eĉ pri sia propra ekzisto. En Fajro kuracas la poeto proponas siajn servojn al la



socialismo, li oferas sian propran personon al la klasbatalo cele al la fina venko de la socialismo.

Kvankam la seriozo de la poeto estas senduba, tiuj socirealismaj poemoj malhavas la personan sinceron de la poemoj en Prologo, sinceron, kiu esploras sen

indulgo la poetan animon. Oni povas demandi: Ĉu poeto esprimu, tiom kontraŭdira en si mem, kiel la du poemlibroj atestas, estas plene fidinda? Miĥalski mem donas la respondon en la poemo Mi estas ..., kie li eldiras Mi estas pokalo de belpoezio; Mi estas martelo de ver' ... kaj aldonas Mi kreas por krei. Li rigardis sin mem unuavice kiel kreanton, kiu celas la veron – per rimedoj, kiuj nenion indulgas, eble je la kostoj de la poezio mem. Pli ver-celaj poemoj apenaŭ troviĝas en Esperanto.


Ankaŭ forme la poezio de Miĥalski estas io aparta. Ĝi estas interese libera, kvankam la poeto uzas ankaŭ kutimajn formojn kiel rimojn kaj verspedajn ritmojn. Miĥalski estas la unua Esperanto-poeto, kiu grandparte uzas liberajn versojn kontraste al la tradiciaj, klasikaj verso-formoj. Sed pli atentinda estas lia uzo de la lingvo mem, de signife densaj kunmetitaj vortoj, foje neordinaraj gramatikaj formoj. Entute oni povas aserti, ke la poezio de Eŭgeno Miĥalski meritas seriozan studadon, kaj je tio mi ne esceptas Fajro kuracas, kvankam iuj nekomprene inklinas rigardi ĝin kiel krudan esprimiĝon sub signo de dogmatismo.

de Baldur Ragnarsson

(Juna amiko, n-ro 96, 2001)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/mihalski.htm>

**P**atro kaj filo iam iris tendumi for de la urbo por ĝui la plezuron vivi dum kelkaj tagoj en la naturo. Post longa bela promenado tra la arbaro, kaj manĝinte ion ĉe la fajreto improvizita per sekaj branĉetoj, la nokto alvenis kaj ambaŭ pretiĝis por dormi. Kaj fakte post nelonge ili endormiĝis profunde, verŝajne pro la laceco paŝadi la tutan tagon. Tamen, je la tria nokte, jen neatendite la patro vekis sian filon:



eta tero estas la ununura planedo kie la vivo floris? Neniu scias! Eble ie en la kosmo, iuj eksterteranoj, same kiel ni, observas la ĉielon kaj sin demandas, ĉu ili estas solaj en la interstela spaco!.. Kaj vi, paĉjo, kion vi pensas?"

"Mi kredas, ke mi havas stultan filon"

"Paĉjo! kial vi diras tion?"

"Ĉu vi ne rimarkis, idioto, ke iu ŝtelis al ni la tendon dum ni dormis?"

(tradukaĵo)

"Filo mia, vekigu! Ne dormu! Vekiĝu! Mi devas paroli al vi!"

"Paĉjo! Kio okazas? Kial vi vekis min?"

"Filo mia, mi volas, ke vi rigardu supren, kaj diru al mi, kion vi vidas"

"Ho, paĉjo, mi vidas la ĉielon!"

"Rigardu pli bone, kion plian vi vidas?"

"Paĉjo, mi vidas la stelojn kaj la lunon!"

"Bone, kaj tio, pri kio pensigas vin?"


"Paĉjo, kiam mi nokte observas la stelojn, mi pensas pri la vastego senlima de la universo! Tiuj miliardoj da galaksioj tiel malproksimegaj! Eĉ se ni vojaĝus lumrapide, ni bezonus milionojn da jaroj por atingi ilin! Ĉu nia



**ELEFANTO kaj MOPSO**

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Laŭ stratoj Elefanto pasis  
 Por montro al publik'.  
 En nia norda land' ĝi estas ja unik', —  
 Do post la best' gapuloj plen-amasis.  
 Subite iu Mops' aperis en la strat', —  
 Kaj al giganta best' sin ĥetis kun aŭdaco.  
 Jen bojas, saitas ĝi sen laco  
 Kaj pretas jam al batalad'.  
 "Amiko, estu vi prudenta,"  
 Ŝaf-hund' avertas nun: "Ĝi estas evidenta, —  
 La best' superas vin. Vi raŭukas pro koler',  
 Sed ĝi en ver',  
 La bojon en la strat' tutplene ne atentas."  
 "He, he! Pri tio mi kontentas."  
 Respondas Mopso kun fier':  
 "Ja sen batiĝ' efekta  
 Famiĝos mi je batemul' perfekta.  
 Do diru hundoj kun respekto:  
 Plejfortas Mopso, sen demand', —  
 Ĝi bojas kontraŭ Elefant'!"



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
 tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
 Ukrainio



Erik Tantal

## La Kimero

Rakonto el la estonteco

1-a Eldono 2020



## Duboj

„Ĉu vi estas kontentaj pri la unuaj staĝaj tagoj en la instituto?“, demandis Sakura. Post la prelego tri novaj studentoj eniris la diskutrondon.

„Terure! Oni vere rimarkis, ke ni vidu nur la bonajn flankojn.

Ili certe bezonas freŝajn trupojn. Sed mi pensas, ke iam poste venos la amara fino“, komentis Elsa, kiu kune kun Sakura laboris en la sekcio por musoj.

Volker ankaŭ konstatis tion: „Jes, ĉio estis nur fasado. La perfektaj bestoterenoj, kiel en paradizo. Ni ja nur neniam pensu pri la estonta sorto de la enloĝantoj“.

„Mi ne scias, kion vi volas, ni ja estas en la Instituto por Besto-Eksperimentoj. Do, ĉiu konas la situacion de la animaloj. Tamen ne estas malutile, ankaŭ konsideri la besto-prosperon“, notis Sven kaj aldonis: „Kaj hodiaŭ nia tagmanĝo estos ruladoj kun bova viando kaj ruĝa brasiko. Tio certe vere bongustos. Mi estas scivolema ĉu iu de vi nur prenos verdan salaton“.

„Ja, jes, vi pravas. Mi pensas, neniu de ni estas pura vegetarano. Nur mia malgranda fratino“, opiniis Jens kaj montris al Irene, kiu sidis apude.

„Kion vi faras, Irene? Ĉu vere, ĉu vi estas tia ne-viando-manĝanto?“, demandis Sakura.

**16>>** moralaj. Grandaj momentoj da ekzalto, malesperigaj krizoj pro neatentitaj bagateloj. Sed kelkaj ŝatas al tio. Aliaj estos detruitaj de tia angoriga amantino.

Kiam tia virino renkontas viron inda je ŝia admiro, genia, forta sed sen memambicio, iom sanktula, ŝi

**18>>** pro diversaj kialoj starigitaj de mia patrino. Sekrete mi sendis aspirileteron al Dresdeno. La respondo ŝi kaptis en la poŝto.

Mi povintus atingi la abituron dum 3 jara lernado ĉe la laborista kaj kamparista fakultato kun la opcio je posta kvinjara studado ĝis la diplomo. Ambaŭflanke okazis „teatraĵoj“, malpermesoj, plorado kaj koleratakaj.

Mi devis unue komenci ĉe aliaj profesioj, por daŭrigi kiel plenkreskulo „mian vojon“. Veran feliĉon mi

Tiam Jens rakontis pri sia avo, kiu posedis grandan stalon por kunikloj en la ĝardeno: „Ni infanoj tie ofte prenis la 'stalo-leporojn' sur niajn brakojn. Ni manĝigis kaj karesis ilin, ĉiufoje, kiam ni vizitis nian avon. Kaj iam, antaŭ la kristnaskaj festotagoj, li kunportis buĉitan kuniklon, la internaĵoj estis elprenitaj. Li donis ĝin al nia patrino dirante al ni: 'Tio estis Muki, kiun vi ĉiam tre bone manĝigis'.

Post tiu tago Irene neniam plu manĝis viandon“.

„Kiom aĉa, via avo! Kial li estis tiom sentakta?“, mallaŭdis Sakura.

Kompateme ŝi ekprenis la manon de Irene, premis ĝin komprenoplene kaj demandis: „Sed kial vi elektis ĉi tiun studfakon? Vi ja devus rifuzi ĉiun besto-eksperimenton!“

Ja, ŝi vere havis dubojn. Eventuale ŝi ja faris eraran decidon. Aliflanke ŝi nepre volis studi ion kun rilato al medicino.

„Ne eblas fari omleton sen rompi ovojn“, intermetis Sven. Li tiel provis iomete gajigi ŝin kaj aldonis: „Kion vi planis por hodiaŭ posttagmeze? Ĉu vi kunvenos al la sporthalo? La seminario ja nur daŭros ĝis la tria“.

Nur Volker ne povis entuziasmi pri sporto kaj proklamis: „Mi iros al la sekcio por primatoj!“.

Sven reagis kun granda miro. „Kial tio? Hodiaŭ ja tute ne okazas nia staĝo!“

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio  
(plumnomo **Erik Tantal**)

povas fariĝi escepta kunulino. Kaj neniu kapablos iam ajn cedi ĝin ŝian celkonscion. Fama ekzemplo pri tio estas Marie Curie kun ŝia edzo Pierre Curie.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

sentis nur dum pentrado kaj desegnado.

Specialernejon pri pentrado/grafiko por estroj de priarta popolklerigado mi povis frekventi de 1974 ĝis 1978 ĉe la Distrikta Kulturakademio en Halle/Saale.

Tiam mi estis 33-jara. Kiam mi poste havis sukcesan ekspozicion, mia patrino malame kritikis min: „Se mi ne bremsintus vin, vi ne atingintus tion“. „Ĉu vere?“, mi pensis kaj englutis tion.

sendis **Helga Plötner** portretistino el Germanio

Farmanto Brown renkontas sian amikon en la vilaĝa bierejo.

- Haroldo, kion vi donis al via bovo, kiam ĝi ekmalsanis?

- Vinagron kaj telerlavilon "Fairy".

Post unu semajno ili rerenkontiĝas. Farmanto Brown diras:

- Ho ve, Haroldo! Mi donis al mia bovo vinagron kaj lavilon "Fairy" kaj ĝi mortis!"

- Ankaŭ la mia! - respondis Haroldo.

\* \* \*

En la lernejo estas esplorataj okuloj de infanoj.

- Ĉu vi povas legi la plej supran linion de la leteroj sur la la tabulo, Tony? - demandas la doktorino

- Ne, - diras Tony.

- Kaj kiel pri la dua linio? Ĉu vi povas legi tie? - demandas la doktorino.

- Ne, - diras Tony.

- Tiukaze ĉu vi povas legi la malsupran linion?

- Ne, - respondas Tony. - Mi ankoraŭ ne scipovas legi entute.

\* \* \*

Estis fino de lernojaro kaj la lernantoj portis donacojn al siaj geinstruistoj. La filo de la posedanto de florvendejo alportis grandan bukedon da floroj al sinjorino Jones. La filino de la bombonvedisto

alportis grandan keston da ĉokolado.

La filo de la posedanto de drinkaĵvendejo ankaŭ alportis egan pezan keston. La instruistino prenis la keston kaj ekvidis el ĝi gutantan fluidaĵon. Ŝi gustumis unu guteton.

- Aĥ, ĉi tio estas vino? - ŝi provis diveni.

- Neee... - respondis la malgranda knabo.

Ŝi gustumis ankoraŭ unu guton.

- Ĉampano? - ŝi reprovus.

- Neee... - diris la malgranda knabo.

- Mi kapitulacas, - diris la instruistino.

- Tio estas hundido, sinjorino.

\* \* \*

- Hej, sinjoro Watson. Vi ankoraŭ estas vestita per la vintra kalsono!

- Dio bona, Holmes! Kiel vi sukcesis tion diveni?

- Vi ree forgesis surmeti vian pantalonon!

\* \* \*

Kiel la monstro nombras ĝis dektri?

Per siaj fingroj!

\* \* \*



tradukis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius** el Litovio

**15>>** pluskribi; sinjoro Samsó, kiu rimarkis, ke la servantino volis nun komenci ĉion detale priskribi, tion per etendita mano decide repuŝis. Sed ĉar ŝi ne rajtis rakonti, ŝi memoris la grandan urĝon, kiun ŝi havis, kriis evidente ofendite: "Adiaŭ ĉiun", returnis sin sovaĝe kaj forlasis kun terura pordoklako la loĝejon.

"Vespere ni maldungos ŝin", diris sinjoro Samsó, sed ricevis nek de sia edzino, nek de sia filino respondon, ĉar la servantino ŝajnis reperturbinta ilian apenaŭ akiritan trankvilon. Ili leviĝis, iris al la fenestro kaj tie restis, sin tenante ĉirkaŭbrakume. Sinjoro Samsó en sia fotelo returniĝis al ili kaj observis ilin silente dum momento. Post li vokis: "Do venu nur. Lasu nun fine la malnovajn aferojn. Kaj indulgu ankaŭ iomete min." Tuj la virinoj obeis lin, rapidis al li, karesis lin kaj rapide finis siajn leterojn.

Poste ĉiuj tri komunece forlasis la loĝejon, kion ili jam de monatoj ne faris, kaj veturis per la tramo en la liberan aeron, antaŭ la urbon. La vagono, en kiu ili sidis solaj, estis tute trabilata de varma suno. ili priparolis, komferte apogite en la seĝoj, la perspektivojn por la estonteco, kaj troviĝis, ke tiuj ĉe pli detala konsidero estis tute ne malbonaj, ĉar la postenoj de ĉiuj tri, pri tio ili efektive ankoraŭ tute ne

pridemandis sin reciproke, estis vere favoraj kaj precipe por la estonteco multpromesaj. La plej grava plibonigo de la situo estis kompreneble facile okazonta per ŝanĝo de la loĝejo; ili volis nun preni pli malgrandan, pli malkaran, sed pli bone situantan kaj entute pli praktikan loĝejon, ol estis la nuna, ankoraŭ de Gregoro elektita. Dum ili tiel interbabilis, sinjoro kaj sinjorino Samsó preskaŭ samtempe rimarkis ĉe la vido al la ĉiam pli vigliĝanta filino, kiel ŝi en la lasta tempo, spite al ĉia plago paliginta ŝiajn vangojn, ekfloris al bela kaj ineca knabino. Fariĝante pli silentaj kaj preskaŭ senkonscie interkompreniĝante per rigardoj, ili pensis pri tio, ke nun venos tempo por serĉi por ŝi bravan viron. Kaj ŝajnis al ili kvazaŭ konfirmo de iliaj novaj revoj kaj bonaj intencoj, kiam ĉe la celo de la veturado la filino leviĝis unua kaj streĉis sian junan korpon.

(Fino)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

**Franco KAFKO (Franz Kafka) \***  
**La transformiĝo (parto 10)**  
**(daŭrigata)**



“Se li komprenus nin”,  
ripetis la patro kaj per fermo de  
la okuloj li enprenis en sin la  
konvinkon de la fratino pri ties  
neeblo, “tiam oni povus eble  
interkonsenti kun li. Sed tiel -”

“For ĝi devas”, diris la  
fratino, “tio estas la sola  
rimedo, patro. Vi devas nur voli  
forigi la penson, ke ĝi estas

Gregoro. ke ni tion kredis tiom longe, tio estas ja nia  
vera malfeliĉo. Sed kiel ĝi povas esti Gregoro? Se ĝi  
estus Gregoro, li delonge komprenintus, ke kunvivado  
de homoj kun tia besto ne eblas, kaj libervole  
foririntus. Tiam ni ne havus fraton, sed povus pli vivi  
kaj memori lin honore. Sed tiel tiu besto nin  
persekutas, forpelas la luantojn, volas evidente okupi  
la tutan loĝejon kaj nin tranoktigi surstrate. Vidu nur,  
patro,” ŝi subite ekkriis, “li jam rekomencas!” Kaj en  
timego tute ne komprenebla por Gregoro la fratino  
forlasis eĉ la patrinon, efektive sin depuŝis de ŝia  
fotelo, kvazaŭ ŝi preferus oferi la patrinon ol resti en la  
proksimeco de Gregoro, kaj rapidis malantaŭ la  
patron, kiu, nur de ŝia konduto ekscitita, ankaŭ leviĝis  
kaj duone levis la brakojn antaŭ la fratino kvazaŭ por  
ŝia protekto.

Sed Gregoro ja tute ne kapricis voli timigi iun ajn  
kaj eĉ sian fratinnon. Li nur ekturiniĝis, por remigri en  
sian ĉambron, kaj tio ja aspektis atentofrape, ĉar pro  
sia malbona farto li devis subteni la malfacilajn  
turniĝojn per sia kapo, kiun li ĉe tio multfoje levis kaj  
frapis kontraŭ la plankon. Li haltis kaj reregardis. Lia  
bona intenco ŝajnis komprenita; la timego estis nur  
momenta. Nun ĉiuj rigardis lin silente kaj malĝoje. La  
patrino kuŝis, la gambojn sterninte kaj kunpreminte,  
en sia fotelo, ŝiaj okuloj preskaŭ fermiĝis pro laciĝo; la  
patro kaj la fratino sidis unu apud la alia, la fratino  
tenis la manon ĉirkaŭ la kolo de la patro.

“Nun mi eble rajtas turniĝi”, pensis Gregoro kaj  
rekomencis sian laboron. Li ne povis subpremi  
ĝemadon pro streĉiĝo kaj ankaŭ devis ie kaj tie ripozi.  
Cetere neniu lin urĝis, ĉio estis lasita al li mem. Kiam li  
finis la turniĝon, li tuj komencis rekte remigri. Li miris  
pri la granda distanco, kiu lin apartigis de lia ĉambro,  
kaj tute ne komprenis, kiel li ĉe sia malforto antaŭ  
mallonga tempo faris la saman vojon, preskaŭ sen

tion rimarki. Ĉiam celante nur rapidan  
krabladon, li apenaŭ atentis pri tio, ke  
neniu vorto, neniu ekkrio de lia familio lin  
ĝenis. Nur kiam li estis jam en la pordo, li  
returnis la kapon, ne komplete, ĉar li  
sentis la kolon rigidiĝi, tamen li ankoraŭ  
vidis, ke malantaŭ li nenio ŝanĝiĝis, nur la fratino estis  
leviĝinta. Lia lasta rigardo tuŝis la patrinon, kiu nun  
estis komplete endormiĝinta.



Apenaŭ li estis en sia ĉambro, kiam la pordo  
estis urĝege fermepremita, riglita kaj ŝlosita. Pro la  
subita bruo post si Gregoro tiom ektimegis, ke liaj  
gambetoj faldiĝis. Estis la fratino, kiu tiom rapidis.  
Rekte ŝi jam staris kaj atendis, facilmove ŝi poste  
antaŭsaltis, Gregoro tute ne aŭdis ŝin veni, kaj “Fine!”  
ŝi kriis al la gepatroj, dum ŝi returnis la ŝlosilon en la  
seruro.

“Kaj nun?” sin demandis Gregoro kaj  
ĉirkaŭrigardis en la mallumo. Li baldaŭ malkovris, ke li  
nun tute ne plu kapablis moviĝi. Li ne miris pri tio, plie  
ŝajnis al li nenature, ke li ĝis nun vere povis formoviĝi  
per tiuj maldikaj gambetoj. Cetere li sentis sin relative  
agrabla. Li ja havis dolorojn en la tuta ventro, sed  
ŝajnis al li, kvazaŭ ili pli kaj pli malfortiĝus kaj fine tute  
foriĝus. la putrintan pomon en sia dorso kaj la  
inflamiĝintan ĉirkaŭon, kiuj estis tute kovritaj de mola  
polvo, li jam apenaŭ sentis. Al sia familio li repensis  
kun emocio kaj amo. Lia opinio, ke li devas malaperi,  
estis eble ankoraŭ pli decida ol tiu de lia fratino. En tiu  
stato de malplena kaj paca pensado li restis, ĝis la  
turhorloĝo batis la trian matenhoron. La komencon de  
la ĝenerala pliheliĝo ekstere antaŭ la fenestro li  
ankoraŭ ĝisvivis. Poste lia kapo sinkis sen lia volo tute  
malsupren, kaj el liaj naztruoj malforte eliĝis lia lasta  
spiro.

Kiam frumatene venis la servantino - pro puraj  
forto kaj hasto ŝi fermbatis, kvankam oftege ŝi estis  
petita tion eviti, ĉiujn pordojn tiom, ke en la tuta loĝejo  
depost ŝia alveno ne plu eblis trankvila dormo -, ŝi  
trovis ĉe sia kutima viziteto ĉe Gregoro unue nenion  
eksterordinaran. Ŝi pensis, ke li kuŝas intence tiel  
senmove kaj ludas la ofenditon; ŝi kredis lin ĉiuspece  
sprita. Ĉar ŝi hazarde tenis enmane la longan balailon,  
ŝi provis, el de la pordo, per ĝi tikli Gregoron. Kiam ne  
montriĝis sukceso, ŝi ekkoleris kaj iomete enpuŝis en  
Gregoron, kaj nur kiam ŝi puŝis lin de lia loko sen ia  
rezisto, ŝi ekatentis. Kiam ŝi baldaŭ komprenis la  
veran staton, ŝi grandigis la okulojn, fajfis antaŭ si,  
sed ne longe perdis tempon, sed malfermegis la  
dormĉambran pordon kaj kriis laŭvoĉe en la



mallumon: "Vidu nur, ĝi mortaĉis; tie ĝi kuŝas, absolute mortaĉa!"

La geedzoj Samsio sidis rekte en la geedza lito kaj klopodis superi la timegon pro la servantino, antaŭ ol kapti ŝian mesaĝon. Sed poste sinjoro kaj sinjorino Samsio, ĉiu je sia flanko, urĝege eliĝis el la lito, sinjoro Samsio ĵetis la kovrilon sur siajn ŝultrojn, sinjorino Samsio elvenis nur en la noktoĉemizo; tiel ili paŝis en la ĉambron de Gregoro. Intertempe ankaŭ la pordo de la salono malfermiĝis, en kiu Greta dormis depon la enloĝiĝo de la sinjoroj luantoj; ŝi estis tute vestita, kvazaŭ ŝi tute ne dormintus, ankaŭ ŝia pala vizaĝo ŝajnis pruvi tion. "Morta?" demandis sinjorino Samsio kaj rigardis demande al la servantino, malgraŭ ke ŝi povis ja ĉion mem ekzameni kaj eĉ sen ekzamenado ekkoni. "Tion mi ja kredu", diris la servantino kaj puŝis por pruvo la Gregoran kadavron per la balailo ankoraŭ grandan pecon flanken. Sinjorino Samsio faris movon, kvazaŭ ŝi volus reteni la balailon, sed tiel ne faris. "Nu", diris sinjoro Samsio, "nun ni povas ĉiuj danki Dion." Li krucosignis sin, kaj la tri virinoj sekvis lian ekzemplon. Greta, kiu ne deturnis la okulojn de la kadavro, diris: "Vidu nur, kiom malgrasa li estis. Li ja tiom longan tempon jam nenion manĝis. Kiaj la manĝaĵoj envenis, tiaj ili elvenis." Efektive la korpo de Gregoro estis komplete plata kaj seka, oni ekkonis tion vere nur nun, kiam ĝi ne plu estis levata de la gambetoj kaj ankaŭ nenio alia deturnis la rigardon.

"Envenu, Greta, momenton al ni", diris sinjorino Samsio kun melankolia rideto, kaj Greta iris, ne sen rerigardi al la kadavro, malantaŭ la gepatroj en la dormĉambron. La servantino fermis la pordon kaj komplete malfermis la fenestron. Malgraŭ la frua mateno al la freŝa aero jam estis almiksita ioma varmeto. Nu, jam estis fine de marto.

El sia ĉambro elpaŝis la tri sinjoroj kaj mirigite serĉis ĉirkaŭrigarde sian matenmanĝon; oni forgesis ilin. "Kie estas la matenmanĝo?" demandis la meza inter la sinjoroj grumble al la servantino. Sed tiu metis la fingron al la buŝo kaj poste signis haste kaj mute al la sinjoroj, ke ili bonvolu veni en la ĉambron de Gregoro. Ili ankaŭ venis kaj poste staris, la manojn en la poŝoj de siaj iom eluzitaj jakoj, en la nun jam tute hela ĉambro ĉirkaŭ la kadavro de Gregoro.

Tiam malfermiĝis la dormĉambra pordo, kaj sinjoro Samsio aperis en sia livreo, ĉe unu brako lia edzino, ĉe la alia lia filino. Ĉiuj aspektis iom plorintaj; Greta fojfoje premis sian vizaĝon al la brako de la patro.

"Tuj forlasu mian loĝejon!" diris sinjoro Samsio kaj montris al la pordo, sen delasi la virinojn de si. "Kion vi celas per tio?" diris la meza inter la sinjoroj iom konsternite kaj ridetis dolĉafekte. La du aliaj tenis la

manojn surdorse kaj ilin senĉese frotis unu kontraŭ la alia, kvazaŭ en ĝoja atendo de granda disputo, kiu tamen por ili devis finiĝi favore. "Mi celas ĝuste tion, kion mi diras", respondis sinjoro Samsio kaj iris en unu linio kun siaj du akompanantinoj fronte al la sinjoro. Tiu staris unue silenta kaj rigardis planken, kvazaŭ la aferoj en lia kapo kuniĝus al nova ordo. "Tiam ni do iru", li poste diris kaj suprenrigardis al sinjoro Samsio, kvazaŭ li postulus en subite lin kaptanta humileco eĉ por tiu decido novan permeson. Sinjoro Samsio al li nur plurfoje iom grandokule kapjesis. Post tio la sinjoro efektive tuj iris per longaj paŝoj en la antaŭĉambron; liaj du amikoj jam ioman tempon atentis kun tute trankvilaj manoj kaj nun vere saltetis post li, kvazaŭ en timo, ke sinjoro Samsio povus antaŭ ili enpaŝi la antaŭĉambron kaj ĝeni la ligon kun ilia gvidanto. En la antaŭĉambro ĉiuj tri prenis la ĉapelojn de la vesthokaro, tiris siajn bastonojn el la bastonujo, klinis sin mute kaj forlasis la loĝejon. Pro malfido - kiel montriĝis, tute senkaŭza - sinjoro Samsio elpaŝis en la vestiblon kun la du virinoj; apoge al la parapeto, ili rigardis, kiel la tri sinjoroj desupris ja malrapide, sed konstante, laŭ la longa ŝtuparo, en ĉiu etaĝo en certa kurbiĝo de la ŝtuparejo malaperis kaj post kelkaj momentoj reaperi; ju pli malsupren ili venis, des pli perdiĝis la intereso de la familio Samsio por ili, kaj kiam renkonte al ili kaj poste alte super ili supreniris submajstra buĉisto kun la portilo sur la kapo en fiera teniĝo, sinjoro Samsio kun la virinoj baldaŭ forlasis la parapeton, kaj ĉiuj revenis, kvazaŭ malpeziĝinte, en sian loĝejon.

Ili decidis, utiligi la hodiaŭan tagon por ripozo kaj promeno; ili ne nur meritis tiun laborpaŭzon, ili ĝin eĉ nepre bezonis. kaj tiel ili eksidis ĉe la tablo kaj skribis tri senkulpigajn leterojn, sinjoro Samsio al sia direktejo, sinjorino Samsio al sia mendanto, kaj Greta al sia estro. Dum la skribado envenis la servantino por diri, ke ŝi foriras, ĉar ŝia matenlaboro estis finita. La tri skribantoj unue nur kapjesis sen levi la okulojn, nur, kiam la servantino daŭre ankoraŭ ne volis foriri, oni kolere ekrigardis. "Nu?" demandis sinjoro Samsio. La servantino staris ridetante en la pordo, kvazaŭ ŝi estus anonconta al la familio grandan bonŝancon, sed farus tion nur kiam ŝi estus ĝisfunde pridemandita. La preskaŭ rekta strutplumeto sur ŝia ĉapelo, pri kiu sinjoro Samsio jam dum ŝia tuta deĵortempo koleris, iom ŝanceliĝis al ĉiuj direktoj. "Nu, kion vi do volas?" demandis sinjorino Samsio, al kiu la servantino havis ankoraŭ la plejan respekton. "Nu", respondis la servantino kaj ne povis tuj plu paroli pri ĝentila rido, "do, pri tio, kiel al aĵo apuda estu forigota, vi ne bezonas zorgi. Estas jam en ordo." Sinjorino Samsio kaj Greta klinis sin al siaj leteroj, kvazaŭ ili volus >>13



Ŝi devas fuĝi la maltrankvilemajn, kaj memortigemajn personojn, kiuj vekos en ŝi siajn plej malhelajn, plej negativajn psikologiajn impulsojn, kaj ĉiajn aĵoj kaj cirkonstancojn, kiuj povas igi „elveni“ surfacen le demonojn katenigitajn en la profundoj de ŝia psiko.

Ĉar ĉefe ekzistas en ŝi memdetrua (kaj kiu preterage povas detrui aliajn! ekzemple tiuj, kiuj amas al ŝi) forto, kiu funkcias spite kaj male ĉian logikon. Ŝi tre emas kulpigi aliajn, sed fakte ŝin mem ŝi devus ekzorci, se ŝi volus antaŭgardi sin de malsano, akcidento, aŭ amfiasko.

Ŝi havas fortan karakteron; „malvarmeton“ ŝi ne konas, kaj ŝiaj malpardonemoj estas tiom pasiaj kiom ŝiaj enamiĝoj! Ŝi trudas sian volon nature, eĉ kiam ŝi parolas dolĉavoĉe, iel por mildigi sian ordonemecon.

Al ŝi ege plaĉas logi. kaj ĉarmumi, sed ĉiam oni sin demandas, ĉu ne estas por akiri al ŝi plian sklavon, ŝi antaŭ ĉio deziras servtrudi al si la aliulon korpe kaj anime. Eĉ kiam ŝi estas plej sincera, oni ne povas ne timi, ke fortokolizio prepariĝas. Ŝi estas inteligenta, suspektema, klarvida, kaj emas vidi trans la vortoj. Ŝi sursentas mensongon, kaj facile divenas la kaŝitan intencon de aliulo, fakte tiom, ke ofte ŝi trovas kaŝitajn intencojn eĉ kie estas neniam da !

**L**aŭ la astrologiistoj la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « skorpiaj ».

### VIRINOJ :

#### Korpo kaj sano

Ŝi havas ĉeestsorĉon. malmultas estaĵoj tiom « magnetaj ». La voĉo rekoneblas, voĉo venanta de l'ventro, voĉo « gorĝa », sekseca. En si estas io mistera, kiu allogas, kaj maltrankviligas. La fatala virino, por kiu viroj riuniĝas kaj sinmortigas. Ŝiajn ungojn ofte ŝi pentras per verniso malhelruĝa kaj ornamas de pezaj ringoj.

Ŝi havas ravigan povon, kiun ŝi zorge flegas, la tuta korpo estas ondema, plenkarna, seksalloga.

Kiel la viro tiusigna, la skorpionaskita virino ofte suferas de malsanecoj ligitaj je ŝia sekseco. Ĉu ŝi estas sendezira ĉu troseksema. Kiu ne estas nekunigeble. Ŝi ankaŭ povas suferi je sterileco. Tamen ,kiam ŝi patrinatas, iĝas ŝi vera „lupino“, defendanta siajn idoj kun akreco.

Ŝi estas rimarkinde fortika, „tenas“ dum malfacilaĵoj persisteme. Fakte la realaj minacoj, devenas ciam de ŝi mem, de ŝia maltrankvila temperamento, de ŝiaj memdetruaj emoj.

Pli ol tradiciaj kuracistoj utilos psikologoj, kiuj kapablas konsciigi ŝin (sed ĉu eblas kuraci tion? „Forpeli naturon ,ĝi revenas sturme“) pri ŝia agresemo, kaj ŝia angoremo. Ankaŭ „aliaj“ ekzotaj kuracartoj pli konvenas al ŝi ol la tradiciaj.

#### Kiel ŝi reagas ?

Kun ŝia ekzalta, komplika, « psikanaliza » menso ŝi estos kapabla de la plejbono same kiel de la plejmalbono. De senlima sindediĉo aŭ realigoj, kaj pri semi animdetruon ĉirkaŭ ŝi.

#### Je kio ŝi taŭgas ?

Ŝi estas kuraĝa, malfacila por koni, kaj ne ĝenas sin per skrupuloj. En la vivo povas ŝi fari grandajn aferojn, kondiĉe ke multo petitas de ŝi ; si bezonas malfacilaĵojn malhelpaĵojn malamikojn, ne estas defio, kiun ŝi ne estos ema akcepti.

Ŝi trafe sukcesos en kuraca aŭ prikuraca kampo. Ĉar al ŝi plaĉas agado ŝi ankaŭ povos starigi entreprenon kaj ĝin prizorgos efike, ŝi aŭdacos elpaŝi al homoj, klopodi pro siaj interesoj, nome luktadi. Ĉar ŝi havas belon kaj personecon, ŝi ofte estas petita de fotografoj kaj filmistoj, sed se al ŝi ĉiam agrablas pergajni facile multe da mono, ŝi malbone elportos esti ekspluitita kiel aĵo, ŝi rapide incitiĝos pri tio.

#### Kiel ŝi amas ?

Pasie! kaj volupte! sed kun flanko “religia manto”, kiu ofte timigas virojn. Jes ja tiu, kiu estos de ŝi amita neniam plu renkontos tian virinon, kaj ĉiu ajn alia amrilato aspektos kompare sengusta. Sed ŝi vivigos lin sur “rusaj montaroj”, kun ĝusuproj, kaj teruroj, krioj, senĉesaj riproĉoj kaj persekutadoj, ponardofrapoj >>>12

## Interparolo kun patro pri paco enmonde

- Ĉu eblas paco en la Mondo  
kiam militoj kaj murdoj neniam finiĝas  
kiam klopodoj por haltigi ilin vanas,  
kiam paco estas provizora  
kaj militoj senfine daŭras?!

- Malfacile, sed ne maleblas  
Paradokso estas ke ni ĉiam esti feliĉaj volas  
sed ni alies feliĉon rompi deziras,  
ĉiuj por paco daŭre preĝas  
kaj preta por milito armeon ni havas...

Kiam ni kokinin buĉas  
pluraj el ni sin malbone sentas  
Je miro, pro murdoj en idiotaj militoj ni orgojlas  
kaj same per plezuro spirito nia ebriiĝas

Kiel estu paco en ĉi tiu Mondo  
kiam ni preĝas al komuna Dio  
en kirko, moskeo, turbedo, sinagogo?!  
Mirinde kial tiel frenezaj ni estas..


Ununura preĝejo ja sufiĉus, ĉar Dio estas unu  
ke homoj enpace estu porĉiam,  
ĉar paco en Mondo neniam ekzistos

antaŭ ol religioj rekonsiliĝos  
sen rekonsiliĝo de Islamo kun Kristanismo  
kaj religioj kun Scienco por la tuta homaro.

Kiel povus esti paco en Mondo  
kiam ie ajn en la lernolibroj de historio  
oni instruas infanojn orgojli  
pro grandaj psikopataj murdistoj  
kiuj mortigis multajn homojn de aliaj popoloj?

Kial ĉiuj haste postulas  
igi sian Grandan Aleksandron  
Napoleonon, Ĝingis Khanon kaj Atilon?!  
(du unuaj originas el mia lando)  
kiam ili estis simple mortaj geniuloj  
kaj mortigis kaj perdis milionojn da homoj  
kaj nur dezertiĝon alportis al mondo?!

Ĉu ne estus pli prava  
por plej grandaj mondaj historiistoj  
ke ili kompilu por ĉiuj ŝtatoj komunan  
lernolibron  
kie oni kondamnu krimojn de la pasinto  
kaj unuafoje infanoj eklernu vorton paco?!  
Aŭ eterne daŭrigu kun ĉi tiu paradokso?!



Tirana, 12.09.2016

## La mallibera cikonio

## tradukis kaj sendis Adrienne Pásztor el Hungario

Sola, orfa cikonio  
Staras sur la parcelfino,  
Suprenflugus: for de tie,  
En foraĵojn,  
Super marojn,  
Se ĝi havus plumojn ĉie.

Ĝi meditas surpiede,  
Ĉar enuas sampiede.  
Ŝanĝas tiujn, varietas.  
Laŭ la scio  
L' amuziĝo:  
Se enuas, rekomencas.

Al flugilo nazon ŝovas,  
Pluen vidus, sed ne povas!  
Altaj muroj, kvar bariloj  
Vane provus!  
Kvankam volus,  
Ne videblas trans la limoj.

Alrigardus la ĉielon  
Sed, al tio perdas emon,  
Flugas birdo nekaptita,  
Al libero,  
De la tero,  
Sed, ĝi restas forlasita.

Ĝi atendas kaj atendas:  
ke l' flugilaj plumoj kreskas,  
en la alton suprenflugas  
kie vojo  
en ĉielo,  
lando de libero bluas.

Vestas sin aŭtune l' limoj  
Ne plu estas cikonioj. –  
Nur ĝi estas: mem la orfo.  
senespera  
nelibera  
Kaptita, en eta korto.

Eĉ la grupoj nun viciĝas  
Ankaŭ ili volas, iras.  
Ne videblas, ĝi nur aŭdas,  
Sed tre scias  
kiuj krias,  
La migrantoj tre konatas.

Ĝi dufoje muskolstreĉas;  
Ĉu eĉ nun ĝi ne sukcesas?  
Korpo estus sin levita  
Flugilparo  
Sen plumaro  
Se ne estus detruita.

Cikonio, birdo orfa,  
Jam ne kreskos plumo korpa.  
Ne portos ĝin neĝ' solstica,  
Eĉ se bele  
Kreskus hele,  
Ĝin fortranĉos hom' malica!

-- (1847) verkita de **János Arany** el Hungario (1817-1882)





„La itala pejzaĝo“  
oleo sur presita kartono, 30 x 40 cm, 1961

**M**ia plej granda deziro estis pentrista kesteto kun oleofarboj. Tiu ĉi staris malfermite en montrofenestro de iu farbovendejo. Survoje al mia lernejo ĉiutage mi haltis tie kaj timetis pro tio, ĉu ĝi ankoraŭ estus havebla. Mi admiris la kolor-multecon de la tubetoj, la mikspaletron el ligno, la penikojn kaj la bezonatan instrukcion.


Mi petis mian patrinon aĉeti tiujn oleofarbojn kaj timeme komunikis al ŝi la prezon: 49,00 markoj (de GDR). Mono ĉiam mankis ĉe miaj gepatroj.

En mia duonjara lerneja atestilo mi havis preskaŭ nur la notojn „unu“. Nur en la fako fiziko mi havis la noton „du“. Mia patrino intencis gajni tempon kaj diris al mi: “Se vi ankaŭ en fiziko atingos la noton unu, vi ricevos la pentristan keston.”

En la lerneja paŭzo mi rakontis pri la promeso de mia patrino al mia instruisto de fiziko. Mi petis lin ankoraŭfoje klarigi al mi la kalkuladon per formuloj, kiujn mi ne komprenis dum la instruado. Ĉi-kaze li faris tion por mi kun plezuro. Dank’ al tio mi fariĝis la plej bona en fiziko. Kiam en mia atestilo de la naŭa klaso aperis la noto „unu“, mi memorigis mian patrinon pri la promeso. Ŝi komentis: „Ni ne havas monon por tio.“ Kompreneble mi estis seniluziigita kaj respondis: „Mi lernis duonan jaron por atingi tion. Vi povintus ŝpari por tio dum duona jaro! Promeso restas promeso! Kolere ŝi ĵetis la monbileton pri kvindek markoj sur la kuirejan tablon kaj diris: „Tiam dum unu monato ni ne manĝos buteron!“ „Tiam ni ne manĝos buteron“ mi mokete respondis. Manĝaĵoj ne estis tiom gravaj por mi. Mia patrino devigis min je manĝado, kvankam mi ne havis apetiton aŭ mi eĉ malbonfartis.

Kun iom da malbona konscio mi prenis la monon kaj aĉetis por mi la sopiratan kesteton da oleofarboj. Poste mi legis detale la aldonitan instrukcion. En la

urbo mi renkontiĝis kun Peter Gerlach. Li rakontis al mi pri sia edukado kiel libropresisto. Fiere li montris al mi kolorpresitan bildon pri belega itala pejzaĝo ĉe la Garda-lago. Tio plaĉis al mi! Tion mi volis pentri per miaj novaj oleofarboj. Por tio li donis al mi sian printaĵon.



Hejme mi petis de mia patro kartonon en la grandeco de 30 x 40 cm.

Tuj mi komencis. Mia lerntablo estis ideala por skribado kaj pentrado, ĉar oni povis ĝin facile fiksi je la taŭga alteco. Ofte mi transportis ĝin de la loĝsalono al la dormoĉambro tien kaj reen laŭ la plaĉo aŭ laŭ la temperaturo. Dum la someraj ferioj ĝi staris en la dormoĉambro. Tie mi povis senĝene fari miajn hejmtaskojn, pri legado kaj pentrado.

Sen antaŭskizo mi komencis pentri la ĉielon de supre maldekstre dekstren. Krome mi elprovis sur paperfolio la farbojn kaj miajn miksaĵojn.

La diversajn blujajn tonojn mi miksis tiom longe, ĝis mi atingis la kolortonojn laŭ la printaĵo. Mi pentris sur la bildo nur kiam mi vidis sur krompapero kontentigan rezulton. Malsupre la ĉielo iom pli heliĝis, nuancita kun iom da blankaĵo kaj rozetaĵo. Poste mi pentris la bluverdajn montojn supre en la fono, denove ĉion de maldekstre dekstren, por ke mi ne ŝmirviŝu ĝin per la mano. Mi bone sukcesis kun la oleofarboj.

Neniu montris al mi, kiel oni povis pentri per tio. Post la montoj mi pentris la domojn precize laŭ la deklivoj de la perspektivo kaj mallongigoj kiel sur la modelo. Poste sekvis la floraro. Por la floroj mi dezirintus pli fajnajn penikojn. Mi trovis solvojn.

Per la rando de la kvinmilimetra platpeniko el porkhararo mi fajne surmetis la florojn. Eĉ la ŝtonŝtuparo kun la muro, – kiu por mi estis relative malfacila, – sukcesis finfine.

La helaj domoj kaj la lagobordo respeguliĝis en la akvo, same kiel sur la modela printaĵo. Tio ne estis tiom granda defio por mi. Pentri laŭ la modeloj mi povis: rigardi, pentri, precize rigardi, pentri, profunde kompari, surpentri, ŝanĝi, per ĝojo malkovri, precize rigardi ...

Kiam la bildo pretiĝis, mi estis fiera kaj feliĉa. Tio estis mia unua oleopentraĵo en la naŭa klaso, kiam mi estis dekkvinjara.

Ĝi ricevis mallarĝan kadron, kiun mi antaŭe preparis per blanka lakfarbo por fenestroj.

Mia patrino ne povis ĝoji pri la bela bildo. Ŝi nenion komentis. Finfine mi pruvis al ŝi, ke la aĉetitaj oleofarboj ne estis vanaj.

Tamen mi ne rajtis studi pentroarton en Dresdeno >>12

Donu al mi 20 monerojn tri specaj: 50 L\*, 20 L kaj 10 L por ke ilia entuta valoro estu 500 L ( aŭ 300 L, aŭ 200 L ).



Moneroj el la tempo de imperiestro Teodoso I

### Solvo

Ni formu la ekvaciojn:

$$50x + 20y + 10z = 500$$

$$x + y + z = 20$$

$20 \geq x, y, z \geq 0$  same estas entjeroj.

Dividinte per 10 la unuan ekvacion kaj anstataŭiginte

$$z = 20 - (x + y) \text{ ni ekhavas}$$

$$5x + 2y + 20 - x - y = 50$$

$$\text{Aŭ } 4x + y = 30$$

$$\text{Aŭ } y = 30 - 4x$$

Prikonsiderinte la kondiĉon ke y estas ja natura nombro, ni provu diversajn valorojn de x:

Por x = 1 rezultiĝas y = 26, ne akceptebla.

Por x = 2 rezultiĝas y = 22, ne akceptebla.

Por x = 3 rezultiĝas y = 18 ne akceptebla ĉar 3 + 18 estas pli ol 20

Por x = 4 rezultiĝas y = 14 akceptite, ĉar rezultiĝas z = 2.

**Pruvo** :  $4 \cdot 50 + 14 \cdot 20 + 2 \cdot 10 = 200 + 280 + 20 = 500$

Por x = 5 rezultiĝas y = 10 kaj z = 5, akceptebla

Por x = 6 rezultiĝas y = 6 kaj z = 8, akceptebla

Por x = 7 rezultiĝas y = 2 kaj z = 11 akceptebla

Por x = 8 rezultiĝas y = - 2 ne akcepteblaj.

\* L : signifas mallonge Lek, la albana monunuo



## Dek konsiloj por sukcesi kaj atingi viajn celojn en la vivo

-- el UEA Facila



Jen konsiloj, kiujn mi trovis tre valoraj en mia vivo. Mi esperas ke la ideoj utilis ankaŭ al vi.

1. Alvenu ĝustatempe ĉe via laborejo, anstataŭ malfrui kiel kutime.

2. Apartigu vin de negativaj kaj streĉitaj homoj, ĉar streĉo estas malsano facile transdonebla.

3. Traktu kun homoj, kiuj povas alporti al vi pli: tio estas kun homoj, kiuj estas pli kapablaj ol vi.

4. Konstruu amikecajn rilatojn kun tiuj, kiuj jam estas tie, kie vi volas esti.

5. Estu pacienca kaj konsekvenca en tio, kion vi volas fari, kaj estu preta pagi la prezon por atingi ĝin.

6. Havu tre klaran celon, kaj klare difinu viajn celojn.

7. Antaŭ ol vi decidus rezigni, rigardu la vojon jam trakuritan.

8. Sciu, ke neniu venko povas esti gajnita sen

kontraŭeco nek batalado.

9. Via deziro sukcesi devas esti pli granda ol la timo pri malsukceso.

10. Memoru, ke la plej sukcesaj homoj spertis fiaskojn en iu momento en sia vivo.

La plej grava afero estas via kapablo leviĝi kaj daŭrigi la batalon post ĉiu falo.

Multaj homoj diros al vi, ke viaj planoj ne funkcios. Estas via elekto, ĉu aŭskulti ilin. Sed memoru ĉi tion: negativa menso neniam donos al vi pozitivan konsilon. Ne lasu homojn kun malforta spirito konvinki vin.

Homoj, kiuj vere sukcesas, havas timojn, dubojn kaj zorgojn, kaj tamen ili ne permesas al tiuj sentoj haltigi ilin.

de **Honoré Sebuho** el DRKongo

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/dek-konsiloj-por-sukcesi/>



**K**ian impreson pri la cifero naŭ vi havas? Ĉi-okaze mi volas unue skribi la diferencon en konsidero pri la cifero naŭ en japanio kaj ĉinio.

Due, la naŭa simfonio de Betoveno estas menciita. Laste, mia intereso pri la divido per naŭo estas notita.

Japano ordinale asocias la ciferojn naŭ kaj kvar kun doloro kaj morto de la prononcoj, respektive. Do la ciferoj ne estas ŝatataj en japanio. La ciferoj ne estas uzitaj kiel la unu-cifera ĉambra nombro de hotelo, apartamentaro, hospitalo ktp.

Ĉar la prononco por du-cifera nombro 49 simile asocias doloron pro morto, ĉiam-doloron aŭ surveturon, ĝi ne estas normale uzata kiel la aŭta subpozicia numero.

Alifranke en ĉinio, naŭ estas cifero pozitiva, kiu simbolas bonaŭguron, feliĉon kaj lumon. La lingvo naŭ havas saman prononcon [jiŭ] kiel "longdaŭro". La festo en la naŭa de la naŭa monato laŭ la luna kalendaro (festoj de duobla naŭo) estas alte taksita por la ĉina popolo kaj la tradicia festo kun longa historio. Se diri tiukaze, en ĉinio la lingvo doloro havas saman prononcon [kŭ] kiel en japanio.

(Ankaŭ en Koreio, estas diferenca la pronancoj por naŭ [gu] kaj doloro [go]. Do, koreo ne rigardas naŭon kiel malagrablan ciferon.)

La ĉefaj moroj en la festo estas grimpi sur altaĵon portante kornusfoliojn, trinki vinon de krizantemo, preĝi, ke ilia vivo estu longa kaj la malfeliĉo foriĝu.

Ĉirkaŭ la festotago oni okazigis krizanteman ekspozicion.

La festo okazas ĝuste en la mezo de aŭtuno, kiam la ĉielo estas serena kaj la vetero modera, krizantemo floras kaj acerfolioj ruĝas. Ja estas bona tempo por ekskursi. (Bibliografio: Ĉji Ŝing, "Ĉinaj Tradiciaj Festoj", ĉina esperanto-eldonejo, Pekino 1987)

Lastatempe, la duobla naŭo estis proklamita kiel maljunula tago.

### Sekve mi skribas pri la naŭa simfonio.

Inter la adorantoj pri klasika muziko, cifero naŭ havas ian specialan signifon.

La naŭa simfonio kun ĥoraĵo komponiita de Betoveno estas la plej fama.

Lastatempe tio estas adoptita kiel la eŭropa kanto, kiu laŭdas tutan eŭropon, kaj kiel la simbolo unuecigi Eŭropan Unuiĝon (EU). Krome, la verko estas taksita kiel la kompletigo de la antaŭaj klasikaj muzikoj kaj la monumenta grandskala verko, kiu

fariĝis mejlŝtono por la malantaŭaj romantikaj muzikoj.

Ĉar ne nur Betoveno sed ankaŭ Mahlero kaj Bruknero mortis antaŭ ol ili komponis la dekajn simfoniojn, oni nomas la malĝojigajn okazintaĵojn "la malbeno de la naŭ". La misaŭguraĵo signifas, ke la komponisto mortus se li komponus la naŭan simfonion.

Do, Mahlero nomis lian simfonion respondan al la naŭa "La Tera Kanto" timinte la malbenon, sed vane.

Pro tio povas diri, ke la cifero naŭ havas ian misteran signifon en la mondo de klasika muziko.

### Laste mi deziras esprimi mian intereson pri la divido per naŭo.

Mi semajntage iras al malproksima laborejo. Ĉirkaŭ unu horo mi devas piediri. Dum la tempo, rigardante la numerplatojn (maksimume kvarcifera cifero en japanio) de veturanta aŭ parkanta aŭtoj, mi provas dividi la numerojn per naŭo por ekzercado de mia cerbo.

Vi kompreneble konas, ke la originala numero estas dividebla ekzakte per tri se la sumo de ĉiuj ciferoj estas dividebla per tri. Simile, se la sumo de ĉiuj ciferoj estas dividebla per naŭo, la originala numero estas ankaŭ dividebla per naŭo. La atesto pri tiu ĉi okazo estas ĝuste simila al la okazo en tri. La frekvenco de la dividato en tri estas trioble ol tio en naŭo. Sed mi aŭdacis selekti naŭon kiel dividanton malgraŭ la cifero estas ne ŝatata en japanio, kaj pli malfacila ol tri por kalkuli.

Ĉe unua jeto de rigardo al la numerplato, ni devas distingi, ĉu la sumo de ĉiuj ciferoj estas dividebla per naŭo aŭ ne.

La esoteran taktikon distingi senprokraste mi pensas jene: simpligi la adicon (la nuna celo ne estas la sumo, sed distingi la divideblecon), demeti la ciferojn naŭo mem aŭ kunmetita naŭo. Ni montru ekzemplon!

Supoze ke la sinsekvantaj numeroj aperas 1245, 3479, 1638, 0982, kaj 7776.

$1245 \Rightarrow 1+2+9 \Rightarrow 1+2=3$  (nedividebla per 9),

$3479 \Rightarrow 3+4+7 = 14$  (nedividebla per 9),

$1638 \Rightarrow 1+8+6+3 \Rightarrow 9+9 = 2 \times 9$  (dividebla per 9),

$0982 \Rightarrow 8+2 \Rightarrow 10$  (nedividebla per 9),

$7776 \Rightarrow 3 \times 7 + 6 = 27 = 3 \times 9$  (dividebla per 9).

Ni tuj forlasas la nedivideblajn numerojn (1245, 3479 kaj 982), kaj memoras la divideblan originalan numeron (1638 kaj 7776) inkluzive la ciferan ordonon.

Sekve ni devas dividi ĉi tiun mense akurate per >>>





## Poemetoj

tradukis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

### Privataj Malliberejoj

Regas komerco  
Justec' antaŭ profito  
Malliberej' popola.

### Muroj

Disigitaj fratoj  
Elkora krueleco  
La pont' kripliĝis.

### Inkludeco

Ja ĉiuj kune eblas  
Ĉe l'strat-angul' la loko  
Disiĝo justas.

### Parolas la Agoro

Parolas la Agoro  
Kutimo sen presenco  
Ridas la limo.

### Eklipso

La sun' kaŝiĝis  
Noktis la mondo  
Dolĉis la kruco.

### Monda Etoso

Malplen' kaj inundego  
Filoj de aviduloj  
Vundita mondo.

### Moderna Sklaveco

Rabistoj malsatis  
Kuranta akvo  
Sklavec' morala.

### Demando

De l'normalec' fratino  
Momento demokrata  
Minacata hejmeco.



Poemetoj de **Carmel Borg** el Malto

*Carmel Borg estas profesoro pri edukado ĉe la malta universitato, aŭtoro, poeto kun sociaj kaj etikaj temoj, debat-partoprenanto ĉe diversaj televid- kaj radioelsendoj tra la mondo.*



tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

## La hundo de l'mondofinaĵ'

tradukis kaj sendis Rola Platteau el Francio

**E**n 1996 mi faris vojaĝon en Hindion. Unu tagon ni pasigis en Diu, eksa kolonia portugala insulo sude de l' Guĝerato. Ni restadis unu posttagmezon sur la plaĝo. Fronte al ni : la Antarkto ! Nu, jes, kun iom de Hinda Oceano inter!



Mi ne naĝis, mi ne sunumis. Mi vagis kaj pasigis la plejan parton de la tempo karesante tiun hundon (estas multaj vagantaj hundoj en Hindio) kiu kuŝadis, en 1996 (do li nun estas mortinta...), ŝajne feliĉa (mi fotis lin, vidu : la hundoj ridetas fakte ; kaj spite kion diras Lewis Carroll, ankaŭ kelkaj katoj ridetas, mia nuna rufa kato ridetas, kiam li beate feliĉas) sur la plaĝo, senorge pri la apuda Oceano (nek pri Antarkto).

Mistero de la esto, kaj ktp...

De tempo al tempo pasis apud mi hindianoj, kiuj demandis al mi, konjekteble kun malestimo, « ĉu vi ŝatas la hundon ? ».

Jen, tio estas memoraĵo, kiun mi ne forgesas.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



*ĉisuper la hundo, ĉisube la plaĝo  
(bone rigardu ĉu vi povas vidi Antarkton !)*

>>> naŭ piedirante. Poste ni gajnas la unuajn kvocientojn, 182 kaj 864.

Cerbumante 182 (=>11) ne povas dividiĝi per 9, sed 864 (=>18) povas dividiĝi ekzakte kaj donas 96 (=>15), kiu ne plu povas dividiĝi per 9.

Tian cerbumadon ni devas fari komplete. Dum

cerbumadi, ni kompreneble ne devas adicii numeron de nova aŭto pro eviti trafikajn akcidenton.

Nu karaj, bonvolu fari tiele cerban gimnastikon. Atente!

verkis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

**M**i devas konfesi: estas mi nek kapabla, nek saĝa. Verdire mi stiras aŭton, sed preferas mi veturi per biciklo. Mi havas modernan televidilon, sed mi sentas pli grandan plezuron rigardi tra la fenestro. Mi voĉdonas kiel ĉiuj „la leĝojn mi ne komprenas kaj ne volas kompreni. Dum klubaj kunvenoj mi frotas nazon aŭ dormetas. Mi penas resti ne rimarkita, en diskutadoj mi ne partoprenas kaj neniam diras, kion mi pensas. Sed plej ofte mi pensas nenion. La prezidanto de nia Esperanto klubo eĉ laŭdis min. Ĝis nun mi ne komprenas, kiel tio okazis kaj pro kio oni elektis min al kluba estraro. Tiam mi estis iom eldrinkinta bieron, la kluba prezidanto proponis al mi postenon de kluba vicprezidanto kaj mi kapjesis. Pri tio memoras mi preskaŭ nenion, nur tion, ke ĉiuj ridis kaj aplaŭdis. Vi ne pensu, ke mi estas granda drinkulo. Tute ne, gravas, ke estante sobra mi kapablas al homoj diri nenion. Al mi ŝajnas, ke ili ĉion scias mem. Tamen unufoje mi ekscesis min. Mi mem ne komprenis, kio okazis; povas esti pro la grasa nutraĵo aŭ pro nekutima ĉirkaŭo. Jen mi ekstaris kaj diris:

- "Ĝeamikoj, ni finfine finlernu Esperanton..."

Revenante hejmen post la kluba kunveno iuj atakis kaj pugnobatis min... Mi suspektis, ke tiuj estis samklubanoj... Mi rekonsciĝis post duonhora kaj ekde tiam suspektas ilin. La membroj de la klubo jam delonge timigis min. Ili ĉion komprenas kaj ĉion scias, tamen mi ...nek scias, nek komprenas. Sekvontmatene mi vekiĝis kun doloranta kapo kaj, kiel kutime dum similaj okazoj, mi pensis nur: "Kie mi estis? Kion mi faris?". Ne priskribebla teruro trapikis mian koron kaj nur unu penso nestis enkapo: "Forkuri! Rapide forkuri el la hejmo". Sed mia edzino pacienca, korpuleska virino pacience reviziis miajn poŝojn: forprenis ŝlosilon de la loĝejo kaj lastajn monerojn, tiam diris:

**28>>** la kapo imago, kia estus rakonto, poste – ĝia proksimuma skizo, malnetaĵo kaj jam post tio la rakonto mem.

Ankoraŭ ekzistas branĉo „eseo“. Mi provus priskribi la vivon kaj aktivadon de iu konata esperantisto aŭ eĉ ne tre konata persono por vasta mondo, kiu meritas priskribon. Ja tiaj personoj multas...

Ne, mi ne kontentigis mian senton de envio. Denove mi restos ne verkinta ion por la konkurso. Tamen. Ĉu mi ne priskribu ĉi tiujn pensojn pri la sentoj envii. Ankaŭ tio estas, ja, sufiĉe interesa temo por ia rakonto...

- "Mi alportos bieron".

Mi kuŝiĝis konsterniĝinta, apenaŭ viva kaj en mia kapo nestis ununura penso: „Neniam. Mi neniam pardonos miajn samklubanojn“. Post kiam mi eldrinkis du botelojn da biero, sanstato mia iom pliboniĝis. Sed apenaŭ mi rememoris, ke necesos viziti klubajn kunvenojn, min atakis febro, ekstremis gamboj kaj mi duonkonscie falis sur la sofon.

- "Kion mi faros tie?" lamentis mi. "Mi nenion scipovas."

- "Vi rigardu, kion faras aliaj, tion faru vi," instruis min edzino. "Poste alutimiĝos vi kaj ekplaĉos al vi."

- "Nenio rezultos el tio!" mi kriis, "ĉar mi... vi mem diris... eĉ najlon enbati ne scipovas. "

- "La najlojn tie oni ne enbatas," diris edzino.

- "Eĉ ne scias mi, kiam okazos kluba kunveno," rediris mi.

- "Tio ĉi estas malpli bone... Mi telefonos al kluba prezidanto," diris edzino.

La kluba prezidanto... Kiel nun mi malamas lin. Edzino elektis numeron kaj telefonvokis, sed neniu respondis.

- "Forkuras ratoj!" mi nervoziĝis...

Ŝajne mi komencis deliri. Memoras mi, ke mi kriis: "...en mia cerbo ne kreskas herbo,... mi ŝovos al vi urtikon en la kalsanon...". Tio ĉi tedis al mia edzino. Ŝi ĉirkaŭrigardis, prenis de sur tablo la forketon kaj pikis min inter ripoj... Mi forkuris surstraten... kaj ekkriis:

- "Samideanoj!"

Sed ĉirkaŭe nur vento fajfis. Mi eksentis min forgesita de ĉiuj, soleca kaj malpli saĝa ol ŝajnis al mi antaŭe.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Kaj eĉ ne gravas, ĉu ĝi estos premiita aŭ ne. La sportistoj diras: „Pleje gravas ne venki, sed partopreni en konkuroj!“ kaj ili strebas venki. Kaj ankaŭ mi sekvu tiun saĝan sloganon.

**Dmitrij Cibulevskij** Ĥarkiv Ukrainio

Rakonto sendita por MUZO-98, kiu bedaŭrinde ne okazis.

**LITOVA STELO** 6, 1998 novembro, decembro.

Fonto: **Legolibreto 2** de Jindřiška Drahotová

**E**n septembro estis mia kvara fojo partoprenante la Sumoo-Esperantan legadan movadon.

Mi tre ĝojas scii pli pri Esperanto-parolantoj el ĉiuj kontinentoj de la mondo kiel: esperantistoj en Eŭropo: Francio, Ukrainio, Pollando, Germanio, Slovakio, Hungario, Bulgario, Aŭstrio; Ameriko: Kanado, Azio: Japanio, Vjetnamujo, Nepalo, Israelo ... El ĉi tiuj 16 esperantaj domoj, la plej maljuna estas Elena Popova, Bulgarino - naskita en 1936 kaj eklernis Esperanton el jaro 1959. Mi supozas, ke la plej juna estas Vjetnama Esperantistino - Nguyen Thi Phuong Mai. Mi tre dankas S-inon Helga Plotner - Germana Esperanto-Domo, ke li dediĉis sian pasion al portretado de 16 portretoj de Esperanto-parolantoj tra la mondo.

Mi konstatas, ke ĉiu homo venas al Esperanto alimaniere, sed ĉiuj havas unu komunan aferon: Ili havas grandan amon por Esperanto, entuziasme partoprenas Esperanto-movadojn kaj ĉiam volas Esperanto disvolviĝos en la mondo per la devizo "Paco kaj Amikeco".

Mi sentas min proksima al s-ro Stano Marček, la slovakia Esperanto, mi bedaŭras, ke mi ne povus renkontiĝi kun li pli bone dum mia studado en Slovakio el 1985 ĝis 1998. Se mi sciis s-ron Marček pli frue, mi povus paroli kun li Esperanton. Li povus fariĝi mia Esperanto-instruisto.

Mi ankaŭe fieras koni sinjorinon Phuong Mai, vjetnaman esperantiston. Homo samnacia kiel mi. Mi renkonis kaj parolis kun ŝi multe da fojoj en mia lando.

Ŝi estas tre bela kaj amikeca.

S-ro Hori Jasuo, la japanan esperantiston, kiun mi havis la okazon ekkoni ĉe la Azia-Oceania Kongreso de Esperanto en Danang en 2019. Li donis al mi iujn dokumentojn en Esperanto. Mi legis iujn esperantajn librojn de S-ro Hori Jasuo.



Mi sentas min iom malĝoja ĉar mankas junaj esperantistoj, ĉu hodiaŭaj junuloj interesiĝas pri Esperanto? Kiel Esperanto disvolviĝas, Esperanto pli kaj pli meritas la nomon "Internacia lingvo".

Mia nomo estas Phung Manh Tien, naskita en 1965, konstrua inĝeniero: Mi loĝas kaj laboras en Ho Chi Minh-Urbo, Vjetnamo. Nuntempe mi estas la prezidanto de la Esperanta Asocio de Ho Chi Minh-Urbo, membro de la Komitato de la Vjetnama Esperanta Asocio. Mi antaŭĝojas ekkoni multajn Esperanto-parolantojn tra la mondo, por ke mi povu pliboniĝi mian Esperanton kaj interŝanĝi sperton kun ili pri manieroj disvolvi Esperanton de tie povas kontribui al disvastigado de Esperanto en mia urbo kaj lando. Mia retadreso estas dr.phungmanhtien[ĉe]gmail.com.

**Phung Manh Tien**

Tieno estas mia Esperanta nomo

verkis kaj sendis **Phung Manh Tien** el Vjetnamio



**Krucvort-enigmo**

**KRIPTA FRAZO**

Rekonstruu proverbon (7, 5, 6, 2, 5) interligante apudajn literojn ekde Ŝ al S horizontale, vertikale aŭ diagonale.

Fonto: **Semajno de Enigmoj #6**  
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

**EKZEMPLO**

Patro nia,  
 kiu estas ...

A	P	A	S
T	T	A	K
R	I	S	I
G	N	E	U

Ŝ	L	O	S	I
A	Z	U	O	L
T	S	T	O	N
A	U	O	K	A
R	N	N	E	S



**Enkonduko**

Ho, HOMARO! Vivante mi  
kun Vi multegon vidis  
Deduktante ĉion, al Vi  
ion diri decidis!

Aŭskultu min Vi, kara  
kaj atentu je la tem',  
Dediĉitan al Vi ĉiuj  
kaj ankaŭ al mi mem.

Mi ne bezonas la gloron,  
Laŭdvortojn, titolon.  
Mi nur volas diskonigi  
Vaste mian korvolon!

Mi ne mesaĝas al unu  
ajna popol' aŭ car'.  
Mi mesaĝas al Vi ĉiuj  
tiel nomata Homar'!

Oni nomas nin "La Homo" –  
plej saĝa sur la Ter',  
Senĉese ni devas beni  
tio estas pura ver'.

Unu el ni estas judo  
Kaj alia islamano',  
Kaj jen, la tria kristano  
Sed la sama koro, man'.

Ĉiuj havas la komunajn  
Estintulojn iamajn,  
Kaj la saman ja lulkorbon  
Kaj la gepatrojn samajn.

Ĉiuj kunagnoskas certe  
Tiujn Adamon, Evon,  
Sed militas inter si mem  
Forgesinte ĉefdevon!

Mia celo: tiun devon  
Al HOMAR' memorigi!  
Kaj cetera celo estas:  
Malamon tutforigi!

**Parto 1**

Pri la Via ĉefokupo  
la diraj' ne malveras,  
Vi nur manĝas, kaj trinkas,  
kaj idaron generas.

Kaj ankaŭ la besta regn'  
sur la Ter' samon faras.  
Kaj inter Vi ĉiukaze  
kia diferenc' staras?!

Laŭmie, la malsamo  
troviĝas jen en kio:  
Donacita de Kreinto –  
al vi ja la Konscio!

Por plenumi ĉefan Devon  
uzu la Konscion!  
Unue, Vi ne forgesu  
Vian kreinton – Dion!

Meditu, Vi ĉekomence  
estis akvo etguta,  
Sekve, post eta karnaĵo  
fariĝis Homo tuta!

Dio donis ĉion-ĉion  
kion Vi ja bezonas.  
Ĉu dankeme ĉion-ĉi Vi  
iufoje rezonas?!

Iutempe senerare  
Vi iradas survoje,  
Ekvidante ĉion rektan  
perdas vojon fojfoje.

Iufoje Vi malbonas,  
sed malofte Vi bravas,  
Ĉiupaŝe erarinte  
kaj malofte Vi pravas.

Kaj multfoje, kara Viaj  
aferoj ne malbonas,  
Sed senĉese multaj el Vi  
fieras, fanfaronas!

El Vi mem estas sklavo,  
kaj ankaŭ regantoj.

El Vi estas mizeruloj,  
kaj el Vi estas dantoj!

El Vi mem estas murdito,  
kaj mortinto el Vi  
mem,

El Vi estas foriginto  
el Vi kiu semas sem'.

Memorigi volas mi Vin  
ĉimomente ĝi endas!  
La pendanto estas Vi mem  
kaj el Vi kiu pendas!

Vi gardito, kaj gardinto  
vestinta unuformon.

Vi denuncas, kaj ankaŭ  
atendas la informon.

Jen, pri Via Homa eco  
ankaŭ unu noto:  
Vi mem estas subpremito  
Vi mem estas dispo.

El Vi amasas pigruoj,  
ankaŭ riĉuloj veraj.  
Troviĝas kaj saĝuloj  
kaj ankaŭ la malkleraj.

Vi mem estas malavara,  
iutempe avara.  
Vi mem estas afliktita,  
Vi mem estas tre kara.

Komercadas Vi tre lerte  
kaj tio je la pinto!  
Vi mem mensoga vendinto,  
kaj profan'-aĉetinto.

Ĉe la vicoj de l' Homar', jen  
mi ankaŭ kion vidas  
Unu vico de fidelaj  
ceteraj tuj perfidas.

Kiam vidas Vin bestoj tuj  
por forkuri moviĝas  
Sed ankaŭ en Viaj vicoj  
timemaj troviĝas!



Pro la perdo de l' riĉeco timemaj el Vi multas Pro la maljunec' kaj lac' aliuloj tumultas!	Se Vi volas, nepre povas por ĉiam ĉion fini!	Sur la kolo de Homgento ja svarmas la damno Kion la gento respondas dum la ĉefa kondamno?!
Kiu estas ekbatinta, falinta estas kiu? Kaj ambaŭ estas Homo Via an' estas ĉiu.	Dume vivas kaj Vi havas bonŝancon por absolvi Se ne ŝanĝos Vi la moron malfruos por solvi!	Ĉion plenvoĉe mi diros ne, mi ne estas muta, Via maldec' plen-plenas sur la Planedo tuta!
Jen, kiom da priskribo por Via gent' amasas Ĝian finon ne vidas mi Kalkuli ĉion lacas.	Jam sufiĉas! Kaj ĉesigu ĉion-ĉi Vi kaj pentu! Estu sobra, ne forgesu Vian altrangon sentu!	En la vivo pro la viaj sennombregaj eraroj Ĉiupaŝe, ĉiutage svarmiĝas la baroj.
Vi ja povas la malbonon forigi, elimini	Vi estas "Plej kara" sur Ter' tiel nomiĝas la kron', Vi estas la ĉefreganto sur la tutMond' Via tron'.	<b>(daŭrigota)</b>

## 75-jariĝo de la fino de la Okinava Batalo (3) verkis kaj sendis Hori Jasuo el Japanio

La 23an de junio 2020

La 23an de junio okazis la memorceremonio de la fino de la Okinava Batalo dum la dua mondmilito. La ĉi-jara ceremonio estis malgrandskala pro la koronavirusa epidemio, kaj la ĉefministro ne ĉeestis, nur sendante mesaĝon tre malvarman por la koro de okinavanoj.

Dum la dua mondmilito ĉiuj bataloj krom en Okinavo okazis ekster Japanio, ĉar ĝi estis invado milito de Japanio. Ĝi okazis komence en Ĉinio, kaj poste la batalejoj disvastiĝis en la tuta Azio kaj Pacifiko. En 1945 la japana malvenko estis klare videbla por ĉiuj, sed la registaro rifuzis kapitulacii. Usono komencis bombardi ĉiujn ĉefajn urbojn en Japanio kaj fine, komence de aŭgusto ĝi bombis Hiroŝimon kaj Nagasakion per atombomboj. Kaj en la sama periodo usonaj soldatoj surteriĝis en Okinavon kaj tie okazis kruela batalo.

Ĉiuj bataloj estas kruelaj, sed la krueleco de la Okinava Batalo estis alispeca; en ĝi la japana armeo trudis sinmortigon al la loĝantoj, sekve pli ol 1000 mortis.

La insulo Ie: nombro nekonata  
La vilaĝo Jomitan: 130  
La vilaĝo Mabuni: 58  
La insulo Tokaŝiki: 330  
La insulo Zamami: 177  
La insulo Keruma: 53

(La supra statistiko aperis en la ĵurnalo Mainiĉi. La nombroj estas malsamaj ol tiuj en la suba artikolo. La

oficiala statistiko fare de la registaro ne ekzistas, do ambaŭ ĵurnaloj eble kalkulis laŭ siaj informoj.)



Hodiaŭ mi tradukos artikolojn aperintajn en du ĵurnaloj pri la postvivintoj de tiuj teruraĵoj. Kaj fine mi tradukos poemon prezentitan en la ceremonio.

### 3. Poemo por paco

En la ceremonio de la fino de la Okinava Batalo ĉiun jaron unu poemo elektita el miloj da kandidataj poemoj estas prezentita. En tiu ĉi jaro poemo de f-ino Takara Akane, lernantino en la tria lernejo de la supera mezlernejo de Ŝuri, estis deklamita de ŝi.



En Okinavo estas multaj koralaj kavernoj, en kiuj multaj loĝantoj kaj ankaŭ soldatoj kaŝis sin. Kiam proksimiĝis usonaj soldatoj, patrinoj devis sufoki siajn krontan bebon sub ordono de japanaj soldatoj. Usonaj soldatoj bruligis la kavernojn per flamĵetiloj, kiam japanaj soldatoj kontraŭbatalis. Estis "hospitalo" en la kaverno, sed la malsanuloj kaj vunditoj nur kuŝis tie en mallumo sen medikamento, sen manĝaĵoj kaj sen zorgo. Kaj kiam la trupo moviĝis, tiuj vunditoj estis postlasitaj aŭ pafmortigitaj.

Antaŭ 20 jaroj ankaŭ mi vizitis unu el tiuj kavoj. Ĝi estis tre granda. Eble ĝi povis enhavi 100, 200 homojn. Same kiel en la sekva poemo, la gvidanto

diris al ni, "Malŝaltu la poŝlampojn!", kaj tie ekestis terura mallumo. Mi povis nenion vidi. La gvidanto fosis la grundon, kaj tie aperis ostetoj de mortintaj soldatoj. Ankoraŭ nun restas iliaj ostoj kaj havaĵoj, kaj volontuloj elfosas ilin kaj provas redoni tiujn al la familianoj de la mortintoj. Tiun tempon gelernantoj estis mobilizitaj. Lernantinoj laboris kiel flegistinoj kaj lernantoj helpis la soldatojn. Tiamaniere multaj gelernantoj pereis. Okinavaj koralaj kavernoj estas plenaj de tragedio. F-ino Takara versis pri sia ekskurso al tiu kavo.



Foto: Pro tio, ke la bebo kriis, la soldatoj trovis kaj savis ŝin. Se ŝi estus kun japanaj soldatoj, ŝi havus tute alian sorton. (Aprilo 1945)

## Vi en tiu tempo

"Malŝaltu viajn poŝlampojn!"

Unu post alia la lumo malaperis.

En la perfekta mallumo estis tro malluma, kvankam estis ankoraŭ tagmeze.

Sentante humidan aeron,  
Mi bildigis al mi tiun tempon.

Kiam vi estis bebo kaj ankoraŭ ne kapablis paŝi,  
Via pli maljuna frato lernis, kiel mortigi homojn,  
Via pli maljuna fratino mobilizite ne povis viziti lernejon.

Kiam vi kapablis kuri,  
La herbejo, sur kiu vi povus kuri, estis ruĝega,  
Kaj nenie estis viaj amikoj.

Kiam via adoleskanteco estis rabita,  
Vi jam estis kvazaŭ ĉifono,  
Sen familianoj, sen manĝaĵoj.  
En la kaverno tute malluma,  
La lumo, kiun vi vidis, malaperis kiel iluzio.

"Nu, ŝaltu viajn poŝlampojn!"

Unu post alia la lumo aperis.

La loko, kiun la lampoj lumigis, jam ne estis malluma,  
Sed ankoraŭ tro malluma.

Sentante ŝviteton,  
Mi bildigis al mi tiun tempon.

Ĉar vi ne kriis tiun tempon,  
Oni ne trudis, ke via patrino mortigu vin,  
Vi pluvivis.

Kiam vi donis blankan  
flagon al tiu knabino,  
Ŝi tenis ĝin rekte,  
Kaj ŝi estis savita.

Dankon.

Ĉar vi savis tiun homon,  
Mi estas ĉi tie.  
Ĉar vi vidadis antaŭen,  
Tiu ĉi insulo estas ĉi tie.

Ĉar vi rakontis kun kuraĝo,  
Mi scias,

Malbenon de militoj neniam forgeseblan,  
Valoron de paco neniam perdendan.

Dankon.

"Atentu vian kapon!"

Min kovris la lumo ekstera.

La lumon de espero, kiun vi rigardadis en la mallumo,  
Mi neniam estingas, neniam lasas estingiĝi.

Sentante la tagmezan helan lumon en la pluvsezono,  
Mi kreas la pacan mondon.

Rektan rigardon,  
per kiu vi rigardis min tiun tempon,  
Vian vizaĝon direktantan sin al estonteco,  
Mi neniam forgesos  
Kiel via kunlaboranto por paco.

(fino)





## Mi kaj marto (EKRA2020)

Malmultas moneroj  
En mia monsak'  
Sed ĝojas nun kveroj  
Sub suno, ĉe flak'.  
Malbonas sanstato  
De mia somat'  
Sed ĝojas nun kato  
Murmure en strat'.  
Kaj ĉerpas ĉi ĝojon  
El marto mi nun,  
Prilumas mi vojon  
Per juno de sun'.  
Eksentas mi forton  
En mia somat'.  
En mian aorton  
Nun fluas monat',  
Monato de guto,  
Monato de sun'.  
En ĉiu minuto  
Feliĉas mi nun.


konkurso de **Nikolaj Neĉaev** el Svirsk, Ruslando  
pri poezio en EKRA 2020  
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

## Muzo de Esperanta poezio (EKRA2020)

Muzo havas verdan robon,  
Ŝi vizitas teran globon.  
Muzo flugas al poetoj  
Kun inspiro, epitetoj,  
Rimoj, ritmoj, metaforoj  
Por ke floru verse l' koroj.  
Nun ĉe mia vazistaso  
Kun botel' de friska kvaso  
Mian muzon mi atendas,  
Gloron mondan mi pretendas.  
Muzo metu en la koron  
Epiteton, metaforon,  
Muzo metu en l' animon  
Temon fajnan, ritmon, rimon..  
Poezion altoklasan  
Muzo kreos. Friskon kvasan  
Muzo trinkos. Tiel dankos  
Muzon mi...  
Revoj, revoj... ili dolĉas,  
Ili mian koron sorĉas.  
Ĵus mi kreis la poemon.  
Mia koro havas tremon:  
Ĉu ricevos en Razgrado  
Mi premion pro kreado?

konkurso de **Nikolaj Neĉaev** el Svirsk, Ruslando  
**dua premio pri humuro** en EKRA 2020  
EKRA - Internacia Krea Renkontiĝo "Abritus"

## Ŝercoj



### KURAĜO

Komplimentojn pro via kuraĝo. Vi toleris  
heroe la operacion.

Mi ne komprenas kial vi antaŭe kondukis

tiel netolereme?

Vi sakris, vi ofendis la flegistinojn, vi kriegis.

— Vi ne miru sr-o doktoro, Mi venis nur por purigi la  
fenestrojn.

\*\*\*

Knabeto alvenas hejmen el la  
lernejo malfrue. Lia patro  
demandas lin kolereme:

— Kie vi estis tiom longe, fileto  
mia?

— Viro perdis sian 100 eŭrojn  
sur la strato kaj li serĉis ĝin.

— Ĉu vi helpis al li serĉi?

— Ne. mi staris sur la  
bankbileto.

\*\*\*

— Mi surgenuigis mian edzinon.

— Kaj kion ŝi diris?

— Ŝi diris: Elvenu tuj elsub la lito malkuraĝulo!..

— Kaj vi?

— Mi diris, ke en ĉi tiu domo estas mi kiu komandas.

Mi elvenos, kiam mi trovos tion oportuna. Ka..ka..kkaj  
fi..fi..ffinfine MMI devas de..ddecidi kiam...

off the mark.com

by Mark Parisi



“La aventuroj de Jombor kaj Miki” – infanlibro, originale verkita en Esperanto. Eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Ĵurĉevac (Kroatio), 2020, grafike aranĝis Josip Pleadin, ilustris Ivana Pleskina.

La aŭtoro, Julian Modest, verkinto de ĉi tiuj fabeloj, krome de multo divers-ĝenra, nun estas avo, ema rakonti al sia nepo en unu el siaj ŝatataj lingvoj, en la lingvo Esperanto. Ankaŭ mi estas simil-speca avo, kiu regule rakontadis al siaj infanoj propra-kape kaj laŭ-libre, en Esperanto, iam antaŭ jardekoj, kaj kiu, maljuniĝinte, nun esperas rakontadi en bela Esperanto, al la infanoj de niaj infanoj, al miaj, al niaj nepoj, baldaŭ, denove. Do tre bonvenas al mi jena agrabla fabel-libro.

Mi estas ĝin leginta, kaj trovis ĝin leginda. Mi povos laŭ la sinsekvo modeste proponata de Julian Modest ne nur rakontadi, sed ankaŭ agadi simile, kiel li agadas: iri, iradi - kun nepo, nepino, genepoj - al amuzludejo, provi ĉiun ludilon en printempaj, someraj, aŭtunaj boskaj, parkaj, ŝtonplenaj, flako-plenaj, marĉet-riĉaj ludoparkoj kaj interdomaj ludoplacoj, iri al bestĝardeno, al granda vendejo por infanludiloj, al multbutikita aĉet-palaco, al sporta halo, viziti en interesa momento filmofarejon kun dekoracioj fabelaj aŭ historiaj, trapromeni muzeon konvenan por infanoj, kaj ĉion, ĉion, ĉion, detale preparoli kun la infanetoj, konforme al ilia ritmo de perceptado, komprenado, aĝo.

Mi vizitus parte vere kaj precize la lokojn samajn, Budapeŝtajn: Varoŝmajoron, Urban Boskon, Senfundan Lagon ĉirkaŭkurindan; parte aliajn sed simil-etosajn lokojn, lokalojn, spacojn, terenojn, kiajn vizitis la infaneto Jombor, en Varno kaj en urboj, vilaĝoj de Bulgarujo, kaj kiujn diligente kunvizitis lia mirakla, dek- aŭ nur ok-centimetre granda, jes, malgranda, eta, eteta, sed plenkreskule saĝa amiketo, la verd-pantalona Miki, la saĝa Miki kun verda pantaloento. (Ha, kian pantalonon havadis Jombor? Mi ne scias.)

Mi, ni, vi, geamikoj, gesinjoroj, gemoŝtoj, viaj infanetoj, idoj, nepoj, aŭskultontaj aŭ legontaj, vi ni ĉiuj povas, povos havi similajn rolojn kiajn havis Jombor kaj Miki. Ni, aŭskultante aŭ legante, povos imagi nin maraj rabistoj aŭ bestoprizorgistoj, influate de la libro, verŝajne kun ĝuo vigla, kaj eble samtempe pli sentime kaj pli senzorge, ol faris tion la infanĝardenano Jombor en unuaj momentoj de ĉiufoje nova siutacio.

Ni ja estos plisaĝigitaj, iom instruitaj ĝuste de Miki kaj Jombor. Mi, ni, vi aliaj, geamikoj el familioj kun Esperanto, povos legi la fabelojn kaj, laŭ inspiro de la libro, preparoli sezonojn, plani kaj fari laŭplane kaj malgraŭplane, neĝajn homojn, neĝan infanon, neĝan bubon, neĝan knabineon, neĝan sinjoron kaj neĝan sinjorinon... kaj ni povos renkonti nian propran Avon Nikolao, kun nuanco Brita, Rusa, Bulgara, Hungara, Usona, Afrika, Azia, Aŭstralia, ĉu Eŭrop-Unia, kiu eble tamen citos ion ĝuste el la fabeloj de Julian Modest aŭ uzos liajn lertajn lingvaj kliŝojn por paroli je stilo proksima al infanaj koroj.

Nu, certe vi konstatos, ke mi ne blufis, ke mi parolis pri vere legindaj kaj aŭskultindaj fabeloj. Certe ĉiu el vi, kiel mi, sentos ĉe la fino, ke Miki kaj Jombor estas amikoj ankaŭ de ni, amikoj de legintoj kaj aŭskultintoj de la fabeloj de Julian Modest (ho, kie estas la akcentoj?)

Mi esperas, ke ni havos ĉiam novan generacion da aŭskultantoj de la fabeloj en klara kaj bela Esperanto, kaj mi estas certa, la leg-rakontantoj ĉiam sentos, kia trezoro estas atente aŭskultanta infano.

Blazio Vaha el Hungario



32>> enamiĝis, eble, tamen ne. Ĉu povas mi, ordinara persono, kiu ne scias la arton verki, surpaperigi miajn sentojn pli bone, la siatempe tion faris Stefan Zweig, Lev Tolstoj, Guy de Moupasant kaj aliaj. Des malpli tiu rakonto povos poste pretendi premion. Do, necesas elekti iun pli taŭgan, pli „trankvilan“ temon por la rakonto.

Eble mi verku ion pri mia ŝatata laborokupo? Ofte, ne ofte, sed iam okazadas eventoj indaj, por ke

pri ili aperu rakonto. Tamen la „labora“ temo ne estas populara – ne ĉiuj ŝatas ĝin, des pli evidente la ĵurianoj. Ja, de ili dependas, ĉu premii la rakonton aŭ ne atenti ĝin. Kaj ĉu verki ian sciencfikcian rakonton? La fantastikaĵoj plaĉas al multaj. Mi nur timas, ke mia „sperto“ ne sufiĉos por aperigi bonkvalitan rakonton...

Evidente denove mia deziro partopreni en la konkurso restos ne efektiva. Eĉ la temon estas malfacile elekti. Ĝi devas maturiĝi. Komence aperu en

>>22

**16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner**  
**Nova tre interesa libro de Horizonte (Hori Jasuo,**  
**Japanio)**

**R**icevinte la libron, tuj okulfrapis min la ruĝa-flava kovrilpaĝo kun verda stelo. Sur tiu ĉi kovrilpaĝo estas videblaj la 16 portretitoj en miniatura formato kaj tiel ĝi donas al la legantoj la unuan rigardon en la enhavon kaj scivolemigas ilin.



En mallongaj, tamen informplenaj tekstoj la desegnistino kaj la redaktanto rakontas al la legantoj historieton pri la instigo, kreado kaj evoluo de la ideo por krei tiaspecan libron kaj ĝian longan vojon de la komenco ĝis la preta libro kun artaĵoj, eseetoj kaj fotoj.

Ĉe la unua trafolumado la atenton kaptas la diversstile desegnitaj portretoj. Foje kun fajnaj diferencoj en la linioj faritaj per malmola krajono, foje kun molaj, iom pli dikaj linioj faritaj per mola krajono aŭ per nigra kredo. La elekto de tiuj du desegnostiloj estas tre trafe farita kaj konvenas al la portretitoj. Tamen ĉiu desegnaĵo havas sian specifajon kaj estas nekomparebla unu kun la alia. Je la dua, pli preciza observado de la desegnaĵoj oni povas nur konjekti, kiom da laboro, peno kaj sindonemo entenas ĉiu bildo. Dum plurfoja longa rigardo ĉiam denove videblas rimarkindaj detaloj en la desegnaĵoj. La konscia ludo kun lumo kaj ombro en la portretoj lasas ekkoni la majstrinon en sia fako.

La kombino de desegnaĵoj kaj aldonitaj fotoj de la portretitaj famuloj plivigligas la paĝojn, la eseojn, kaj donas etoson familian. Per unupaĝaj, kelkaj

kortuŝaj, sinprezentaj rakontas la portretitoj pri siaj unuaj kontaktoj kun Esperanto kaj pri instigoj lerni, instrui ĝin aŭ eĉ verki librojn Esperantajn. Ĉiuj rakontas ankaŭ pri tio, kiel Esperanto fascinas ilin. Interese estas ekscii pri la impresa, sindonema agado, laborado, verkado kaj instruado de tiuj 16 eminentaj personoj, eĉ se oni jam konas unu aŭ alian de la portretitoj. Ili rakontas en la eseoj ankaŭ pri si mem, mencias konatajn-nekonatajn, privatajn aferojn, sortojn kaj feliĉigajn eventojn. La libro prezentas al la leganto ne nur aktivajn pensiulojn, sed ankaŭ junajn engaĝigintajn esperantistojn el diversaj landoj. La eseoj respegulas la tre diversajn agadkampojn de ĉiuj portretitaj esperantistoj, kiuj havas la saman celon: disvastigi Esperanton kaj per tiu laboro provi plibonigi la mondon. La etaj personaj verkoj interese, impone vagadigas la legantojn tra eventoplenaj jardekoj de la komenco de la 20-a jarcento ĝis la nuntempo.

En la antaŭlasta paĝo la leganto ekscias pri la longa, impresa agado de la portretistino por Esperanto. Estas vere menciindaj la vivofazoj kaj sukcesoj per la amata, fascina, magia, mondo-kuniganta, entuziasmiga lingvo de la Majstro L. L. Zamenhof. Lia portreto far Helga Plötner troviĝas sur la dorsa flanko de la libro kun verda skribaĵo: „Danke al via mirinda lingvo ni havas Esperanto al nia estonteco.“ La verko evidente montras, kiom multon eblas fari dum la vivo por Esperanto kaj por ĝia progresado. La unuaj kelkaj eseoj instigis min tuj finlegi ĉi tiun impresan desegnaĵ-libron je unu sido.

Estas en plano eldoni duan libron kun portretoj de 16 aliaj aktivaj esperantistoj. Tio denove estos laborego kun geamikoj el multaj landoj laŭ proponlisto de nia tre aktiva, japana amiko Hori Jasuo. La nuna eldono aperis en 300 ekzempleroj kaj la plej multaj jam estas fordonacitaj al la portretitoj kaj geamikoj. Revenis bona eĥo kaj gratuloj el la tuta mondo.

Kiu deziras akiri tiun valoran libron (prezo 5 €), skribu rapide al [helga.ploetner@gmx.de](mailto:helga.ploetner@gmx.de) aŭ telefonu al +49 173 7731545. Ĝi estas mendebla ankaŭ per la libroservo de UEA, azianoj povas kontakti ankaŭ [horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp).

**Ralf Haumer / Helga Plötner**  
 Korekt- kaj kontrollegado Zsófia Kóródy

Fonto: **Festivala Kuriero**, 02-a de aŭgusto 2020, numero 6

MondaFest' La Monda Festivalo de Esperanto 20 junio – 20 septembro

<https://mondafest.net/img/kuriero/kuriero6.pdf>



(unua parto)

Un belan tagon ekiris arbaren malgranda familio. Inter patro kaj patrino fiere paŝadis knabeto. La knabeto nomiĝis Petro. Li estis kvarjaraĝa knabo.

La tutan matenon ili piknikis en arbaro troviĝanta proksime de la familia domo.

Petro gaje saltetis ludante per pilko, poste kuris tra verda herbejo por kapti jen pilkon, jen papiliojn.

Lun momenton li ekvidis duone blankmakulitan katon. Kia bela kato – ekpensis li samtempe alproksimiĝante al la kato. La blankmakulita kato sidis ne moviĝanta atendanta lian reagon.

– Kiu vi estas? – demandis la kato miaŭe al la knabeto.

– Mi estas Petro – respondis la knabo iom surprizite ĉar li kapablis kompreni la bestan parolon. Tuj li estis preta ion diri, kiam li ekvidis hundon staranta apude.

– Mi tre amas vin – diris Petro montrante fingre unue al la kato kaj poste al la hundo.

– Mi vin ambaŭ amas – dolĉe Petro ripetis siajn vortojn.

Tiam la hundo ekbojis

– Av... av... Mi tre amas vin. Belaj vortoj.. ĉu... sinceraj?

Petro respondis gaje – Jes sinceraj. Vere plaĉas al mi via amikeco. Ŝajnas al mi, ke ni konas unu la alian jam delonge .

– Jes, – respondis la bestoj unuvoĉe. – Ja, mi petas vin, ĉu vi akceptu min en via gaja amika rondo? – Petro petis ilin aldonante – Ni ludos kune ĉi tie. Mi ne plu estu sola.

– Kompreneble ni volonte akceptas vin – respondis la hundo gaje svingante la voston al li dum la blankmakulita kato tenere karesis liajn manojn.

Dume la gepatroj de Petro decidis reveni hejmen. La patrino kolektis la varojn metante ĉion en la dorsosakon.

– Mi ne vidas Petron – diris ŝi iomete zorgeme. La edzo tuj respondis formetante la gazeton:

– Mi vidis lin tie, vidalvide al ni. Ja, vere mi perdis lin je mia okulrigardo. Kie li malaperis?

Ili ekis alvoki lin – Petro... Petroooo eĥis tra arbaro.

Dume Petro kaj la amikoj estis brue ludantaj, kiam hundo diris;

– Petro, vidu, tiun birdeton super niaj kapoj. Ĝi estas ne nur nia kantistino sed ankaŭ nia gardistino.

Nome, ĝi flugas alten kaj ĉion vidas.

– Jes, vi pravas. Mi proponas ankaŭ akcepti ĉi tiujn papiliojn por amikiĝi.

– Jes ,jes! – ĉiuj kapjesis gaje.

Subite la birdeto flugile montris, ke io okazas.

– Silenton, silenton amikoj... aŭdiĝas ia maltrankvila voĉo, vokanta Petro, Petro..

– Ja, vere, oni alvokas mian nomon. Tiuj voĉoj estas de miaj gepatroj – diris Petro. Verŝajne ili estas maltrankvilaj ĉar ili ne vidis min. – Petro aldonis.

– Mi devas forlasi vin, karaj amikoj, sed mi promesas, ke ni denove renkontiĝos ĉi tie.

Lia voĉo ŝanĝis. Nun ĝi sonis malgaje.

– Ĝis nova renkonto – respondis unuvoĉe la amikaro.

– Kial vi kaŝis vin sub tiu benko? Petro... Mi demandas vin... respondu... Ĉu vi estis laca kaj ekdormis tie? – demandis lin la patro zorgemvoĉe.

– Kara Petro, kie vi malaperis – demandis la patrino kliniĝanta sur lia kapo.

– Ho, vere Mi ne scias. – akcentis la "mi" iomete embarase.

Li turnis sin ĉirkaŭe por vidi liajn amikojn.

– Kie ili malaperis – flustris li en sia mentono.

La patro prenis lian dekstran manon kaj la patrino la maldekstran. Tiele ili tiradis lin inter si forte tenante liajn manojn.

Baldaŭ ili malsupreniris la enirejon de la Verda arbaro.

Tie troviĝas vico da benkoj. Apud la lasta benko videblas hundeto kaj blankmakulita kato, ĉirkaŭ ili flugis papilioj.


Subite aŭdiĝis la birda pepado "Ĝis nova renkonto"....

Petro turnis sian kapon kapjesante al ili

– Jes miaj amikoj, ni renkontiĝos baldaŭ! – diris Petro okulsigne kaj svingante la manon al la direkto de amikaro.

– Ĝis la nova renkonto – ripetiĝis la birda pepado.

(Fino de la unua parto)



*Solvo de la  
krucvortenigmo*

**KRIPTA FRAZO  
Ŝlosilo uzata ruston ne konas**



Haĉikon en tiu tempo. Eble la reĝisoro uzis tian aranĝon por profiti el la kontrastoj en ĉi tiu drama ago. En la japana filmo, Haĉiko, post la morto de ĝia posedanto iom post iom estas flankenlasita de ĉiuj. Sed la vendisto kaj lia edzino ĉe la stacidomo prizorgas ĝin. Tamen Haĉiko neniam ĉesas atendi sian posedanton. Ĝia morto en neĝa vetero, antaŭ la enirejo de la stacidomo matene en la 8-a de marto 1935, estas montrita kun preskaŭ neŭtrala vidpunkto kaj kun ĝenerala vido, dum la kamerao malproksimiĝas igante Haĉikon pli kaj pli malgrandan inter preterpasantaj homoj kaj tramoj, kaj ni ne povas eviti plori pro ĝia mizera stato.

Senkompata mondo, kun tre malmultaj hundo-amantoj, kaj Haĉiko, kiu vivas kun la memoro de sia posedanto kaj fariĝas ĉiam pli kaj pli soleca, sed obstine ne ĉesas atendi lin ĉe la pordo de la stacidomo ĉiuvespere en la sama horo !

En la usona versio, la filino de la profesoro montriĝas pli interesema kontraŭ la hundo. Kvankam lia edzino unue envas la amon de la viro al la hundo, ŝi poste fariĝas pli komprenema. En la japana versio, estas unu komenca sceno en kiu ni vidas, ke la familio ne volas adopti hundon hejme. La kialo estas, ke iliaj antaŭaj hundoj mortis do ili ne volas sperti la saman doloron denove. Ili adoptas Haĉikon laŭ la insistado de la filino, kiu poste, kiam la hundo alvenas hejmen tute ne zorgas pri ĝi, kaj kiam ŝi edziniĝas, ŝi estas tute for.

Ĉiuokaze kaj resume, laŭ mi, la japana versio tre bone priskribas la nekompatemon de ĉi tiu mondo, la egoismon de la homoj, kaj la ligan de amo inter la profesoro kaj Haĉiko.

En la dua filmo, ni vidas la nepon, kiu rakontas la historion titolitan "Mia Heroo" de Haĉiko kaj sia avo antaŭ nigra tabulo en la lernejo. En la fino, ĉiuj samklasanoj, kiuj aŭskultas la rakonton, aplaŭdas lin. La rakonto tre impresas ilin. Sed ĉi tiu fino por mi ŝajnas tre usoneca.

Koncerne la dramon agadon, ambaŭ scenaroj estas senkonfliktaj kaj "glataj". Tio estas, ke post la morto de la profesoro estas neniu surprizo aŭ nodo-solvo en la rakonto. Tamen ambaŭ filmoj spektiĝas

sin. Se vi amas hundojn, se vi amas katojn, se vi amas naturon, ĉi tiuj filmoj tre impresos vin same al mi. Ne necesas diri, kiom lojalaj kaj fidelaj estas la hundoj. Legu ankaŭ la veran historion de Haĉiko, kies ligilon mi aldonis en la fino de ĉi tiu teksto! <sup>1</sup> Ĝi estas en turka lingvo sed vi facile trovos iun tekston pri Haĉiko en via lingvo. Hodiaŭ antaŭ la elirejo de tiu stacidomo troviĝas la statuo de Haĉiko. Ankaŭ en Tokio en la Nacia Muzeo pri Naturo kaj Scienco troviĝas la enbalzamita korpo de Haĉiko.

Fine, mi raportas pri alia simila okazaĵo: iu hundo en Jalto, urbo en Krimeo, spertas la saman dramon post la morto de sia posedanto. La hundo, kies posedanto droniĝis, ankoraŭ atendas lin sur la strando de Jalta haveno. La krimeaj-tataraj popoloj en la kvartalo nomis la hundon "Muhtar" (esperante kvartalestro). La kialo pri tiu nomo estas, ke ĝi neniam forlasas la strandon kaj protektas la regionon. La hundon nutras la homoj en la najbarejo kaj la plej proksima persono al ĝi estas la rusa strat-trumpetisto Viktor Malinovskiy. "Muhtar" aŭskultas la kantojn sur la strando dum la strat-trumpetisto muzikas. Post kiam la posedanto de la hundo droniĝis, multaj homoj, inkluzive la trumpetisto, volis preni ĝin hejmen kaj adopti ĝin, sed ĝi ĉiam revenis sur la strandon, kie mortis sia posedanto, kaj daŭre observas la ŝipojn kaj la maron. La loĝantoj de Jalto nun multe klopodas, por ke la 14-jaraĝa hundo pluvivu trankvile. Loĝantoj de la regiono diras, ke preskaŭ ĉiuj en Jalto konas la malĝojan historion de Muhtar kaj nun Muhtar estas la simbolo de Jalto. Se ĝi mortos, ili starigos ankaŭ ĝian statuon.



Haĉiko, Muhtar kaj la aliaj... Ĉiuj fidelaj amikoj de homoj, mi amas vin!

<sup>1</sup> <https://ajanim.com/insanliga-verdigi-ders-ile-efsane-olan-hachiko-kopegin-hikayesi/>

Verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkio  
25-a de oktobro 2020  
Buyukada , Istanbulo

**Lernu de anseroj – letere sendis niaj germanaj amikoj**

La scienco malkovris, ke anseroj flugas formante „V-on“, ĉar kiam ĉiu birdo frapas la flugilojn, organizas movon en la aero, kiu helpas al ansero, kiu iras malantaŭ la unua. Flugante en „Vo“ la grupo pliiigas sian flugkapablon kompare kun individua flugo.

**Konkludo:** Kiam ni dividas komunan direkton kaj komunecan senton, ni povas pli facile kaj pli rapide atingi nian celon. Tio estas mutuala helpo.

Ĉiufoje, kiam ansero eliras el la formacio kaj sentas la aeran reziston, ĝi rimarkas la malfacilon por flugi sola kaj ĝi tuj denove enkorpiĝas en la grupon por profiti kaj ŝpari forton.

**Konkludo:** Se ni havas la anseran logikon, ni kutimiĝas kun tiuj, kiuj moviĝas en sama direkto kiel ni.

Kiam kondukanto de anseroj laciĝas, anstataŭas ĝin de malantaŭ alia ansero kaj prenas ĝian vicon.

**Konkludo:** Ni atingus pli bonajn rezultojn, se ni alternus por plenumi malfacilajn laborojn.

La malantaŭaj anseroj eligas sonon kaj ili ofte eligas ĝin por stimuli tiujn, kiuj antaŭas por gardi la rapidpovon.

**Konkludo:** Kuraĝiga vorto okazigas grandajn rezultojn.

Kiam ansero malsanas aŭ estas vundita de pafado, du el ĝia grupo sekvas ĝin por helpi kaj protekti ĝin kaj restas kun ĝi, ĝis ĝi denove kapablas flugi aŭ ĝis ĝi mortas.

**Konkludo:** Nur se ni havas anseran inteligentecon, ni restus ĉe aliulo, helpus unu al alia, akompanante ŝin aŭ lin. Gravas precipe memoreti, ke kiam la bonaj viroj kaj virinoj kuniĝas solidare kaj altruisme, por aferoj dignaj kaj ĝustaj, la mondo pli rapide antaŭeniĝas.

**Prezidanto aŭ prezidento**

Prezidanto estas gvidanto de diskuto, kunveno, kunsido... La vorto devenas de latina praesidens (sidanta antaŭe), ĉi tiu – praesidere (sidi antaŭ), de kiu estis prenita la esperanta formo prezidi. Nuntempe estas grandega nombro da diversaj prezidantoj – de kluboj, asocioj, societo, parlamentoj, akciaj kompanioj, bankoj... Ĉiu gvidanto aŭ estro emas nomi sin prezidanto (eĉ en la litova lingvo, kvankam en ĝi estas pli taŭga vorto – pirmininkas).

Tamen estas unu grava ofico – gvidanto de

respubliko, „kapo“ de stato, kiun oni nomas prezidento, por distingi tiun postenon de aliaj, malpli signifaj rezidantoj. En la litova lingvo tiu distingo ne eblas, en Esperanto – jes. Se tiun postenon okupas virino, eblas diri prezidentino, sed distingu ŝin de

prezidentedzino. Tamen ne estos eraro, se ankaŭ virinon ni nomos prezidento.



LITOVA STELO, numero 5, 1999.

**La sentoj de envio**

Envio neniam estis la ĉefa trajto de mia karaktero, kvankam ĝi akompanis min tra la tuta vivo.

En la junaĝo mi ĉiam enviis prosperantajn sportistojn, precipe tiujn, kiuj perfekte scipovis korbopilki aŭ naĝi – ja mi apenaŭ povis fari tion. Mi admire rigardis ankaŭ virtuoze kurantajn fingrojn de iu fama muzikisto tra piana klavaro kiuj aŭdigis belegan muzikon.

Precipe mi enviis junulojn, kiuj senĝene povis alparoli ajnan knabinon, onatiĝi kun ŝi, danci, amuziĝi. Kontraste mi, ĉiam ĝenita, ne sciis pri kio paroli kun ŝi, kiam kaj kiel ŝerci (mia humursento tuj malaperadis). Des pli – mi ne scipovis danci. Sidante kun amikoj en kafejo mi same, kiel aliaj, babiladis, anekdotumis, ŝercis. Tamen, kun la apero de iu knabino iuj katenoj denove kaptis min, pezigis mian langon, senridetigis la vizaĝon.

Eble pro tio mi ŝatis kaj nun ŝatas multe labori – tion mi kapablas fari sufiĉe bone kaj neniu povas malhelpi al mi. Mi estas majstro.

Kun la aĝo komencis aperadi novaj sentoj de envio: kial, do, iaj poetoj tiel libere verkintaj, ŝajnas, facilajn versaĵojn, gajnas premiojn (verdire, ne ĉiuj tiaj versaĵoj meritus atenton, pluraj el ili estas tute ne kompreneblaj por mi) kaj en siajn dikajn monujojn ili aldone enmetas tioman gajnitan monsumon. Fakte, eble nur tio ne elvokas la envisenton – mi ne estas monavara, kvankam mia monujo (povas esti ĝuste pro tio) preskaŭ ĉiam estas malplena.

Do, finfine ankaŭ al mi venis la ideo provi miajn fortojn sur ĉi tiu kampo – sur la kampo de verkado. Cetere, la poezio... mi ne estis naskita kiel poeto. Vere, kelkfoje mi provis versumi, sed pli ol 4-6 linioj ne aperadis el sub mia plumo. Kaj sentis mi, ke la kvalito de tiuj linioj taŭgas nur por ĉetabla deklamo al la plej proksimaj amikoj. Sed eble prozo? Ĉu mi provu verki iun rakonton? Ĉu mi verku, kiel mi la unuan fojon